

(EN ESPERANTO)

ISSN 0032-4361

10 1993

中國新道

EL POPOLA

ĈINIO





Belaj tegmentrandoj

Foto de **YAN JIN**

INTER NI

En numeroj de la kuranta jaro vi jam publikigis artikolojn, kiujn mi delonge deziras legi, nome pri film-arto kaj piedpilko en via lando. Tiaj artikoloj estas tre bonvenaj, ĉar popoloj de ĉiuj mondpartoj ja amas piedpilkon kaj en la antaŭaj numeroj vere mankis informoj pri ĝi en Ĉinio.

Mi informas al vi, ke la ĉina reĝisoro kaj aktoro Zhang Yimou (Ĝang Jimoŭ) jam ekfuroras en Brazilo, ĉar en la pasinta marto prezentigis en multaj grandaj urboj de nia lando lia filmo "Pendu alte la ruĝa lanterno", kiun ordinaj film-amantoj kaj recenzistoj entuziasme akceptis. Mi esperas, ke liaj aliaj filmoj baldaŭ prezentigos ĉe ni.

**JOSE FRAUZINO
DE SOUZA**
(Brazilo)

Tre ofte mi montras fiere la revuon al miaj geamikoj, kiuj ankoraŭ ne lernis Esperanton, sed kies deziro koni la belan universalan lingvon, estas kreskigita de la koloroj de malproksima kaj malbone konata eksterlanda vivo.

PHILIPPE BRULARD
(Belgio)

Lastafoje mi ricevis vian 3-an numeron. Koran dankon! Mi legis, ke mi sukcesis en via konkurso de Aeolus-pokalo kaj ricevis aŭtomodelon, kiu estas bela kaj interesa kaj staras sur la unua loko en mia benko. Mi estas tre danke ma al vi kaj ankaŭ fiere, ke mi gajnis duan lokon en via konkurso. Mi estas via fidela leganto kaj

partoprenos en ĉiuj viaj konkursoj. Mi partoprenos en la Valencian Kongreso kaj partoprenos en renkontiĝo de legantoj de via revuo.

ANDRZEJ GIELERT
(Pollando)

Ne plaĉas al mi la ordo, laŭ kiu vi enlistigis la titolojn de la artikoloj en vian enhavo-tabelon. Mi preskaŭ ne konsultas ĝin pro tio kaj "malindeksiĝas" same kiel sinjorino Enriqueta Sesmero de Hispanio.

**HENRIQUE ANSELMO
SILVA BRAGA**
(Brazilo)

Antaŭe ni enlistigis la titolojn de la artikoloj laŭ nia kutimo, kio ne plaĉas al niaj legantoj. Ekde nun ni laŭvice entabeligos la titolojn, por ke niaj legantoj facile konsultu ilin.

La Red.

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Altefika agrikulturo disvolviĝanta en Ĉinio
- 7 Frekvenc-spektra fizioterapia aparato
- 8 *HISTORIA MISTERO:*
Misteraj pendantaj ĉerkoj
- 10 Shi Chengtai kaj lia Esperanta literaturo
- 12 Poemoj
- 12 *POR KOMENCANTOJ:*
Malbelulino
- 14 Ponto de amikeco: Samarkand — Xi'an
- 15 *ESP-NOVAĴOJ*
- 16 Granda olekampo en konstruado
- 17 *AMUZOJ*
- 20 *VERDIGO EN ĈINIO:*
Bambuoj verdigas Zhejiang
- 24 *REFORMADO:*
Starigi novan scienc-teknikan sistemon
- 25 *ARTOJ DE ĈINIO:*
Interesoplenaj pentraĵoj de s-ro Liu Bojun
- 28 *ITINERO PROPONITA:*
Budhisma sanktejo Emei-monto
- 29 *MOROJ DE ĈINAJ NACIOJ:*
Moroj ĉe la Silka Vojo
- 32 Manikeismaj temploj serĉataj
- 36 Rajto de amo (Novelo)
- 38 Ĉinaj studentoj en eksterlando
- 40 La vivo de ĉinaj profesiulinoj
- 42 Vivo, filozofio kaj pekina gusto
- 44 Furoras en Pekino favorataj bestoj
- 48 *KURANTAJ AFEROJ*
- 50 *EL ĈINAJ GAZETOJ SUR LA KOVRILO:*
Fiŝista knabino Foto de **Da Wei**
- 2 Belaj tegmentrandoj
- 18 Changdao
- 34 Qianjiang
- 46 Junaj amantoj de rokmuziko

*INTERNE DE LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]*


Sur la rivereto Rio en Giulio
Sunsubiro ĉe malsupra Lago de
Mantova


SUR LA DORSKOVRILO:

Ĉe fonto en arbaro

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Zhejiang-provinco (p. 20)
- 2. Shanshan-gubernio (p. 16)
- 3. Dunhuang (p. 29)
- 4. Turpan (p. 32)
- 5. Xi'an (p. 14)





Grenkulturo en arbaro



Sekigo de greno

XING ZHOU:

Altefika agrikulturo disvolviĝanta en Ĉinio

SAJNAS nekompreneble, ke de antikve Ĉinio estas lando agrikultura, tamen la fundamenta vivteno de la ĉina popolo ne estis garantiata dum longa tempo. La kaŭzoj kuŝis en jeno: Ĉinio longtempe estis en la feŭda kaj duonfeŭda socio, kaj la disvolviĝo de la produktaj fortoj estis serioze malhelpata, kaj plie, estis multaj katastrofoj kaj estiĝis la produkta metodo, tial la agrikultura produktado disvolviĝis malrapide kaj la popola vivo estis malriĉa. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, disvolviĝis la agrikultura produktado kaj iagrade pliboniĝis la popola vivo, tamen en kelka tempo, pro neraciaj politikoj tro rapide multiĝis la loĝantaro, dum malmultiĝis kampoj. Hodiaŭ Ĉinio havas pli ol 1.1 miliardojn da loĝantoj, inter kiuj 800 milionoj estas kamparanoj. El la 9.6 milionoj da kvadrataj kilometroj da tero de Ĉinio estas 127 milionoj da hektaroj da kampoj, kiuj konsistigas 7% de la totala kamparo de la tuta mondo. Por vivteni la ĉinan loĝantaron konsistigantan 22% de la loĝantaro de la mondo, Ĉinio ĉiam prenas agrikulturon kiel la bazon en la disvolviĝo de nacia ekonomio. Post longtempa penado, precipe dank' al la politikoj, kia la respondeca sistemo de laŭkontrakta familia produktado, kiujn oni praktikis en la ĉina kamparo de la lastaj 15 jaroj, leviĝis la aktiveco de la kamparanoj, tiel ke rapide disvolviĝis la agrikultura produktado. En 1992 la produktokvanto de greno atingis 442.5 miliardojn da kilogramoj kaj multoble pliiĝis la produktokvanto de koton, oleo, sukero, viando, ovo, lakto k.a., tial

fundamente solviĝis la problemo pri manĝado kaj vestado de la popolo.

En la 90-aj jaroj, surbaze de daŭra kresko de produktokvanto, la ĉina agrikulturo suriros la novan etapon de alta produkto, bona kvalito kaj granda profito.



NOVA DISVOLVIĜO DE AGRIKULTURO

La disvolvo de la agrikulturo altprodukta, bonkvalita kaj bonefika neniam signifas nei la antaŭan agrikulturon de alta produkto, tamen tion postulas la disvolviĝo de agrikulturo mem. T.e., plantado, bredado kaj paŝtado, forstokulturado kaj fiŝbredado senescepte devas disvolviĝi laŭ tiu direkto.

Alta produkto signifas pligrandigi la totalan produktokvanton de la ĉefaj agrikulturaj plantoj, precipe grenaj, kotonaj kaj oledonaj. Ĉinio estas disvolviĝanta lando, la pokapa riĉfonto estas tre malmulta, tial pligrandigi produktokvanton kaj garantii liveradon de la ĉefaj agrikulturaj produktoj estas tasko longtempe alfrontata.

Bona kvalito signifas plialtigi la kvaliton de agrikulturaj produktoj. Post kiam la kvanto de agrikulturaj produktoj estas sufiĉa por la bezono de la popola vivo, ne nur la konsumantoj postulas plialtigi la kvaliton de produktoj, sed ankaŭ la produktantoj devas strebi al tio por plialtigi sian konkurencon povon sur merkato.

Komerca efiko estas la fundamenta postulo de



En prilaborejo por freŝkonservo

komerca agrikulturo kaj estas ankaŭ la fundamenta movforto de la akumulo kaj disvolviĝo de agrikulturo mem. Nur la altefika agrikulturo povas multigi la enspezon de la kamparanoj, alporti al ili riĉan vivon kaj akceli la agrikulturan modernigon.

La kuna disvolviĝo de alta produkto, bona kvalito kaj alta efiko signifas, ke la agrikultura produktado en la nuna Ĉinio devas sin bazi sur la kuna disvolviĝo de tiuj tri flankoj.

Disvolvi la altefikan agrikulturon signifas turni la ĉinan tradician agrikulturon en la modernan, kaj turni la memsufiĉan aŭ duonmemsufiĉan naturan ekonomion de la kamparo en la merkatan. Post la finiĝo de la turniĝo agrikulturo konformos al la postulo de la merkato, mildigos la kontraŭdiron, aperintan en la lastaj jaroj, inter abundo da malbonkvalitaj agrikulturaj produktoj kaj nesufiĉo de la bonkvalitaj sur la merkato, solvos la malfacilaĵojn en vendo de agrikulturaj produktoj, altigos ekonomian efikon de agrikulturo kaj donos pli da laboroj al loĝantoj en la kamparo.

Efektivigi tiun turniĝon de la ĉina agrikulturo estas la bezono daŭre firmigi la pozicion de agrikulturo en la nacia ekonomio. Ĝi liveros pli multe da bonkvalitaj materialoj al industrio, plivastigos la merkaton de industriaj produktoj en la kamparo kaj plirapidigos la agrikulturan modernigon.

PRENI MERKATON KIEL MOVFORTON

Por disvolvi la altefikan agrikulturon en Ĉinio oni devas novigi la tradician koncepton pri greno kaj efektivigi la bonkvalitecon kaj variecon de agrikulturaj produktoj. Samtempe oni devas ekspluati ĉiajn riĉfontojn de la tuta tero por plivastigi la spacon de la altefika agrikulturo kaj ne devas dependi nur de la nun ekzistantaj kampoj.

Oni ankaŭ devas puŝi agrikulturajn produktojn al merkato. Longtempe en Ĉinio oni praktikis la planizitan administran sistemon, ke la ŝtato monopoligis la aĉetadon kaj vendadon de la ĉefaj agrikulturaj produktoj. La sistemo rompita la rilaton inter kamparanoj kaj merkato, kaj la kamparanoj ne povis

aranĝi sian produktadon laŭ la bezono de la merkato. Tio malhelpis la aktivecon de la kamparanoj. De la mezo de la 80-aj jaroj Ĉinio liberigis la entreprenadon de agrikulturaj produktoj, kiaj akvoproduktoj, fruktoj, legomoj, brutoj, kortobirdoj, ovoj kaj lakto, kio ege multigis iliajn produktokvantojn kaj senĉese plivastigis la proporcion de bona kvalito kaj alta efiko. Nun Ĉinio fiksas nur la prezojn de greno, kotono, tabako, silkraŭpa kokono, kunpremita teo kaj ligno de norda Ĉinio, dum la prezoj de aliaj agrikulturaj produktoj estas liberigitaj sur la merkato. La aĉeta kaj venda prezoj de greno estis fiksitaj sur sama nivelo en la unua duonjaro de 1992, kio tre malmultigis la grenan subvencion donitan de la ŝtato. En la triono de la gubernioj de la tuta lando oni liberigis la grenan entreprenadon kaj en kelkaj kotonproduktantaj provincoj oni prove liberigis la entreprenadon de kotono.

Praktiko pruvis, ke liberigi la entreprenadon de agrikulturaj produktoj, puŝi ilin al merkato kaj efektivigi bonan kvaliton kaj bonan prezon estas la fundamenta movforto por rapidigi la disvolviĝon de agrikulturo.

REGULIGO DE LA AGRIKULTURA STRUKTURO

La kontraŭdiro inter liverado kaj bezono de agrikulturaj produktoj de Ĉinio estis kaŭzita ĉefe de la neharmonia strukturo de la planizita ekonomio. La funkcio kaj efiko de la sistemo de merkata ekonomio jam fariĝis interna movforto por reguligi la agrikulturan strukturon. Post kiam la agrikulturaj produktantoj ekhavas sian ekonomian memstarecon, sub la makroreguligo de la ŝtato ili povas aranĝi sian produktadon laŭ la bezono de la merkato.

Rilate al la struktura reguligo de plantado, sub la kondiĉo stabile altiĝi la produktokvanton de greno kaj aktive disvolvi multspecajn entreprenojn, oni devas turni la tradician strukturon "greno kaj ekonomia planto" en la strukturon "greno, ekonomia planto kaj brutonutraĵo" kaj senĉese levi la sintezan utiligadon de agrikulturaj plantoj. La specioj

de greno kun alta produkto kaj nebona kvalito, nekonformaj al la bezono de la konsumantoj kaj debito-malhavaj sur merkato, paŝon post paŝo malmultiĝos laŭ la reguligo de la planta strukturo. Nekompleta statistiko farita en 1992 diris, ke en Guangdong, Zhejiang (Ĝeĝjang), Anhui kaj aliaj 3 provincoj oni jam reguligis plantajn speciojn kaj kulturis bonrasan hibridan rizon sur 2.47 milionoj da hektaroj, je 1.19 milionoj da hektaroj pli multe ol tiuj en 1991. Nun la areo de bonrasa tritiko jam konsistigas 80% de la totala kulturata areo de tritiko. Oni kulturis ankaŭ bonrasajn legomojn, fruktojn, florojn k.a.

En 1992 la nombro de grandaj dombestoj de Ĉinio atingis 135 milionojn, inter kiuj estis multaj bonrasaj, kaj la proporcio de malgrasa viando de bonrasa porko superis 50%. Ĉinio dediĉas grandan atenton al fiŝbredado, samtempe energie disvolvas fiŝkaptadon en malproksimaj maroj de la pasintaj 10 jaroj, kun bona ekonomia efiko. En 1992 oni kaptis 15 milionojn da tunoj da fiŝoj. Ĉinio konstruis multajn kampoŝirmajn forstojn, kiaj la Trinorda Kampoŝirma Forsto (en norda, nordokcidenta kaj nordorienta Ĉinio), Forsto ĉe la Meza kaj Malsupra Basenoj de Yangzi-rivero, Marborda Forsto kaj Ebenaja Forsto. La arbarizita areo jam atingis 33.3 milionojn da hektaroj, kio forte akcelis la agrikulturan disvolvigon.

SCIENC-TEKNIKAJ FORTOJ

Multjara praktiko montris, ke sin apogi sur la progreso de scienco kaj tekniko kaj altigi la kvaliton de la laborantoj estas ŝlosilo por efektiviĝi la modernigon de la ĉina agrikulturo. Tial la scienca esplorado pri agrikulturo, edukado kaj teknika disvastigo devas servi sin al disvolvo de altefika agrikulturo.

Nun la scienca esplorado pri agrikulturo iras sur la merkaton. Por kontentigi la bezonon de la altefika agrikulturo oni faras gravan reguligon al la aranĝo de sciencesploraj fortoj kaj ilia ĉefa celo. Ekzemple, partoprenigi sciencesplorajn fortojn okupiĝintajn pri greno, kotonon k.a. en la esplorado de bonkvalitaj agrikulturaj produktoj kaj tiujn, kiuj okupiĝis pri semkulturado, en esplorado pri plantado, protektado de plantaĵoj, manĝaĵfarado, prilaborado, konservado k.a.

Nun aperas ĉiujare meznombre 7000 fruktoj el la agrikultura esplorado de Ĉinio. Ili estas de plantada metodo, traktado de produktoj, kulturado de novaj specioj de agrikulturaj plantoj, dombestoj, kortobirdoj kaj fiŝoj, reformado de kultura sistemo kaj senalkaligo de kampoj. Pli ol 60% de la sciencesploraj fruktoj estas disvastigataj en malsamaj gradoj. Ekzemple, la hibrida rizo de Ĉinio estas kulturita sur 83.74 milionoj da hektaroj da kampoj, ĉiu hektaro pliproduktis meznombre 2 300 kilogramojn da rizo. La hibridaj fiŝoj estas bredataj en pli ol 20 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj la jara produktokvanto estas ĉ. 100 000 tunoj.

La vasta kamparano kun granda intereso lernas sciencon kaj teknikon. En la kamparo de la provincoj Shandong, Hebei, Zhejiang (Ĝeĝjang) kaj Fujian (Fuĝjan) estas starigita reto de scienco kaj tekniko. En la lastaj jaroj nur en Shandong-provinco 10.85 milionoj da kamparanoj estis trejnataj teknike kaj ludis aktivan rolon en la disvastigo de agrikulturaj scienco kaj tekniko.

SENPRECEDENCA AGO DE KAMPARANOJ

Kun la disvolvigo de la komerca ekonomio en la ĉina kamparo, en multaj lokoj fondiĝis unuigita entreprena sistemo de komerco, industrio kaj agrikulturo, kun strikta kombiniĝo de produktado, prilaborado kaj cirkulado, kaj disvolviĝis certaskalaj varoproduktaj bazoj kaj regionaj ĉefaj industrioj.

Nun la ĉefa tasko de la entreprena unuigita sistemo de komerco, industrio kaj agrikulturo estas disvolvi prilaboradon, freŝectenadon, transportadon kaj vendadon de agrikulturaj produktoj. Guangdong-provinco, kies kampara ekonomio disvolviĝis rapide, investis pli ol 2 miliardojn da janoj por disvolvi prilaboradon kaj freŝectenadon de agrikulturaj produktoj kaj la tuta provinco povas konservi kaj freŝceti 60% de la totala produktokvanto de oranĝoj.

Por rapide turni la produktan ekonomion al la vara ekonomio, granda nombro da kamparaj kolektivaj organizoj kaj ĉ. dekoj da milionoj da kamparanoj partoprenas en la vara cirkulado. Jam havas rudimentan skalon la var-cirkulaj organizoj de diversaj regionoj, entreprenoj kaj posed-sistemoj, kiaj pograndoj kaj tempolimaj merkatoj de agrikulturaj produktoj. En Guangdong-provinco 800 000 kamparanoj okupiĝas pri vendado de agrikulturaj produktoj. En Fujian-provinco oni organizas milionon da kamparanoj por vendi bonkvalitajn agrikulturajn produktojn sur la merkato en- kaj eksterlanda.

Por disvolvi altefikan agrikulturon Ĉinio devas praktiki la politikon pri agrikultura malfermo al aliaj landoj, partopreni en la konkurenco sur la internacia merkato kaj utiligi la riĉfontojn de la merkato en- kaj eksterlanda por ŝanĝi sian organismon. De 1978 ĝis la fino de 1992, Ĉinio utiligis alilandan investon de 5 miliardoj da usonaj dolaroj por agrikulturo. Pekino, Ŝanhajo, Chengdu kaj aliaj 5 grandaj urboj utiligis 60 milionojn da usonaj dolaroj pruntedonitajn de la Monda Banko por disvolvi fiŝbredadon en dolĉa akvo. En la sinteza reguligado de la Ebenajo de Norda Ĉinio oni utiligas alilandan investon por reformi kampojn, fari akvoutiligan konstruadon kaj enkonduki bonrasajn semojn.

La disvolvo de la altefika agrikulturo estas grava por Ĉinio. La ŝtato tre zorgas pri tiu laboro, ellaboris koncernajn politikojn kaj forte subtenas ĝin en diversaj flankoj, kiel multigi la investon al agrikulturo, plibonigi produktajn kondiĉojn kaj plifortigi agrikulturan administradon. ■

SHI PING:

Frekvenc-spektra fizioterapia aparato

ANTAŬ tre tre longa tempo oni jam aplikis naturajn terapiojn, kiaj tiuj de lumo kaj pluvo. Poste en la tradicia medicino de Ĉinio aperis ĉigong-o, masaĝo, akupunkturo kaj mokso, kiuj aplikigas ankaŭ hodiaŭ. La kemiaj medikamentoj ludis gravan rolon en la medicina historio, tamen oni iom post iom konis ilian malutilan funkcion, t.e. en kuraco de malsano ili kaŭzas ankaŭ certan polucion en la korpo kaj detruas ĝian naturan ekvilibron.

Por trovi naturan benefikan kuracmetodon, en kiu oni ne donas medikamenton, sciencistoj de diversaj landoj faris grandan penadon. Inter ili juna ĉina sciencisto Zhou Lin atingis kontentigan sukceson: Li inventis frekvenc-spektran fizioterapian aparaton.

S-ro Zhou Lin studis pri elektrizado kaj aŭtomatigo de ŝipoj. En la lernejo li kaj liaj kamaradoj estis atakitaj de pernio. Kvankam ili multfoje konsultis kuraciston, la malsano ne ĉesis turmenti ilin. Pro tio li multe interesiĝis pri kuraco de pernio. Li trovis, ke la temperaturo de la haŭto suferanta de pernio estas nur 22°C, multe pli malalta ol tiu de la normala haŭto samloka. El tio li sciigis, ke la haŭto suferanta de pernio resaniĝos nur tiam, kiam ĝi varmiĝos kaj normaligiĝos la tiea sang-cirkulado. Sed kiamaniere varmetigi la malsanan haŭton, kie la sang-cirkulado estas anormala? Zhou Lin havis neniun metodon por tio.

Fininte sian studentan vivon, li revenis en la maŝin-fabrikon,

kie li laboris. Iutage li glatigis muldaĵon, starante apud granda smirgorada maŝino. La muldaĵo, glatigite de la smirgorado, estis ege vibrigata. La vibroondoj trankuris lian tutan korpon kaj forte tremigis lin. Ĝuste en tiu momento, iu brila penso eklumigis lian menson.

En la okuloj de kuracistoj, la homa korpo konsistas el haŭto, muskoloj, sango, ostoj, organoj kaj ĉeloj, sed en la okuloj de Zhou Lin, ĝi estas komplika, sin-teza radia fizikkampo. Ĉu oni povas funkciigi la eksteran fizikkampon al la homo por reguligi la homan fiziologian staton? Dank' al sia eksterordinara energio, li forigis ĉiujn malĝojojn, kaŭzitajn de la malvenkoj, kaj komencis sian esploradon kaj eksperimentadon.

S-ro Zhou Lin opinias, ke la homa korpo estas biologia radia fonto, kiu eligas varmon, lumon, elektron, magneton kaj diversajn mikropartiklojn. Li nomas homa frekvenc-spektron tiun sintezan fizikkampon kun pluraj mezureblaj parametroj. Ĉe la homa malsanigo malsaniĝas ankaŭ la normala homa frekvenc-spektron. Se la ekstera fizikkampo kun sufiĉe granda energio simila al la homa frekvenc-spektron vibrigas la homan korpon, do aperas pariĝa fenomeno. Dank' al la pariĝo, resonanco, harmonio kaj kontraŭfidro de la frekvenc-spektron, la malsana frekvenc-spektron renormaliĝas. Ekde 1983, gvidate de la medicina teorio de frekvenc-spektron, s-ro Zhou kombinis fizioterapion de la okcidenta medicino kun ĝinglŭo-a teorio de la ĉina medicino, lum-elektran tek-

nikon kun bioimita tekniko kaj post 5-jara senlaca laboro li elfaris "grandefikan oscilatoron", similan al la homa frekvenc-spektron. Surbaze de la biologia kontraŭfidro, li elpensis la metodon konversaciigi homon kun aparato kaj faris serion da frekvenc-spektraj fizioterapiaj aparatoj.

En la pasintaj 10 jaroj multaj fundamentaj eksperimentoj kaj klinika praktiko de 20 milionoj da fojoj montris, ke la aparato de s-ro Zhou Lin estas rimarkinde efikaj en plibonigo de mikrocirkulado, reguligo de la centra nerva sistemo, intensigo de la imunologiaj funkcioj kaj kuraco de la infektiĝo kaŭzita de virusa malsano. Pli ol 90% de la malsanuloj estis resanigitaj, dank' al kuraco per tiaj aparatoj.

La nova teorio pri frekvenc-spektron kaj la aparato estas multe atentataj de la en- kaj eksterlandaj medicinistaj rondoj kaj alte taksataj de la Ŝtata Scienc-teknika Komisiono kaj Higiena Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko. Novembre de 1989, en la pekina kolokvo multaj ĉeestantoj opiniis, ke s-ro Zhou faris revolucion en la tradicia medicino kaj vivologia scienco. Oktobre de 1985, la Monda Organizo de Intelektua Proprieto de UN okazigis en Bulgario la Unuan Mondan Kunvenon de Scienc-teknikaj Fruktoj de Junaj Inventistoj. En ĝi s-ro Zhou Lin ricevis la oran medalon. Decembre de 1986, en la Eureka Foiro de Mondaj Inventoj okazinta en Belgio li ricevis la medalon Kavaliro kaj premion Nova Invento. Septembre de 1987, en la Internacia Foiro de Novaj Inventoj okazinta en Madrido li ricevis Specialan Reĝan Premion...

La de li inventitaj aparatoj nun funkcias en multaj ĉinaj sanatorioj kaj hospitaloj. Ili funkcias ankaŭ en multaj ĉinaj familioj. Tiaj aparatoj estas patentitaj en pli ol 40 landoj kaj nun vendiĝas en 47 landoj. ■

Misteraj pendantaj ĉerkoj

de WU WEN

LA vivon ĉiam akompanas la morto. Ili estas paro da eternaj kontraŭdiroj. Pri tio oni havas malsamajn konceptojn. Kiel oni zorgas pri la kadavro de mortinto, tio strikte rilatas al la supre diritaj konceptoj. El tio naskiĝis malsamaj sepultoj.

En la antikva Ĉinio estis diversaj sepultoj, kiaj enterigo, kremacio, enakvigo, surarbigo kaj ĉiela sepulto, tamen la pendigo de ĉerko ne estis trovita el la supre diritaj sepultoj. Dum longa tempo en la okuloj de la mondo tiu ĉi sepulto ĉiam estis mistera.

La supre dirita sepulto per pendanta ĉerko signifas meti la ĉerkon sur krutaĵon aŭ en naturan aŭ artefaritan kavernon sur rokmuro. La pendantaj ĉerkoj estas boatformaj aŭ ortangulaj.

Kial do oni pendigis la ĉerkojn sur krutaĵoj? Kiamaniere ili faris tion? Por scii tion ĉinaj kaj alilandaj fakuloj organizis en 1987 esplorgrupon. La grupanoj vizitis multajn lokojn de suda Ĉinio, faris ĉiuf flankan kaj sisteman esploradon. La Ĉina Centra Televido faris la dokumentan filmon "Antikva Mistero", montrantan la pendantajn ĉerkojn de Ĉinio. La misteroj nun iom post iom solviĝas.

KIE KUŜAS PENDANTAJ ĈERKOJ?

Pendantaj ĉerkoj troveblas en 10 provincoj en suda Ĉinio, el kiuj la montregiono Wuyi (Uji) de Fujian (Fuĝjan), Guixi (Gujŝji) de Jiangxi (Ĝjangŝji) kaj Yibin de Sichuan estas lokoj, kie

koncentriĝas pedantaj ĉerkoj.

Wuyi-monto sidas ĉe la limo inter la provincoj Fujian kaj Jiangxi. Ĝi estas grava pitoreskejo de Ĉinio. Jiuqu (Ĝiŭĉju)-rivereto lirlas en la montvalo. Ambaŭborde de la serpentuma rivereto verdas arboj kaj bambuoj, apike groteskas krutaj montpintoj. En libro legiĝas, ke sur Wuyi-monto kuŝas miloj da pendantaj ĉerkoj. Vojaĝisto de Ming-dinastio Xu Xiake (1586-1641) skribis en sia taglibro: "Dazang-montpinto altas je milo da *jen*-oj (*jen*-o estis mezurunuo de longo en la antikva Ĉinio, unu *jen*-o egalas ĉ. 2.5 metrojn). Ĉe la montsupro estas pluraj kavernoj kun multaj tabuloj horizontale metitaj kaj sur la tabuloj oblikve kuŝas boatformaj ĉerkoj." Novelisto de Qing-dinastio Pu Songling (1640-1715) skribis en sia novelaro "Notoj pri Strangaĵoj de Ljaŭĝaj": "Wuyi-monto havas montpinton altan je milo da *jen*-oj. Oni plurfoje trovis jadpecojn sub ĝi. Informiĝinte pri tio, prefekto ordonis centojn da homoj fari eskalojn por surgrimpigi la montpinton kaj de tie rigardi la strangaĵon. Post 3 jaroj la eskaloj estis faritaj. La prefekto grimpis supren. Apenaŭ li atingis la supron, li vidis grandajn piedojn kun dikfingro granda kiel lavbatilo kaj aŭdiĝis laŭta voĉo: 'Iru malsupren, alie vi falos!' La prefekto surpriziĝis kaj tuj malsupren iris. Apenaŭ li atingis la teron, la tabuloj rompiĝis kaj falis surteren." Sub la plumo de Pu Songling la pendantaj ĉerkoj portis misterajn kolorojn. En la lastaj jaroj oni trovis 2 boatformajn ĉerkojn sur Wuyi-monto. Fakuloj konstatis post ek-

zameno per karbono-14, ke oni metis ilin tien antaŭ 3 600 jaroj. Sur Wuyi-monto loĝis antikvaj bajjŭe-oj. En la longtempa evoluado la bajjŭe-oj iom post iom kunfandiĝis kun han-oj. Iuj el ili havas ian rilaton ankaŭ kun la nunaj ĝuang-oj, li-oj kaj taj-oj.

Longhu-monto de Guixi estas sankta loko de taoistoj kaj ankaŭ fama pitoreskejo. Tie la pejzaĝo estas tre bela. Luxi-rivereto kiel silka rubando interligas la 99 montpintojn, 24 rokojn kaj 108 vidindejojn. Sur la rokmuroj Arkva Roko, Fea Roko, Feina Roko, Feĉerka Roko kaj Ravina Roko kuŝas proksimume cent tombaroj, de 10 m ĝis 60 m altaj super la akvosurfaco. Arkeologoj faris dufoje prifosadon kaj elterigis 16 kompletajn skeletojn kaj 200 specojn da kuntombigitaĵoj, kiaj ceramikaĵoj, bluaj porcelanaĵoj, bambuaĵoj, silkaĵoj kaj linaĵoj. Oni konstatis, ke ili estas objektoj faritaj inter 770-221 a.K. Tie estis loĝloko de la antikvaj bajjŭe-oj.

La subprovinco Yibin de Sichuan, sudokcidenta Ĉinio, estis loĝloko de la antikvaj bo-oj. La tiel nomataj bo-oj ja estis ĝanĝalanoj. Yibin estas honorita kiel la unua urbo de Yangzi-rivero. Ĝuste tie kunfluas la riveroj Minjiang (Mingĝang) kaj Jinsha (Ĝinŝa) kaj de tie elfluas la mondfama Yangzi-rivero. En Yibin estas miloj da pendantaj ĉerkoj de bo-oj, kiuj metiĝas sur krutaĵoj ĉe la bordo de la riveroj Jinsha, Minjiang kaj Yangzi. Sole en Gongxian (Gongŝjan)-gubernio kuŝas 200 tiaj ĉerkoj. Sur la krutaĵoj troviĝas sennom-

braj truoj por meti palisojn aŭ subtenilojn por pendantaj ĉerkoj. La gubernia kroniko konigas, ke la tieaj enĉerkigitoj vivis almenaŭ antaŭ 400-700 jaroj. La ĉerkoj kuŝas en la lokoj de 30 m ĝis 200 m altaj super la akvosurfaco. En la fino de la 16-a jc kaj la komenco de la 17-a jc malaperis la bo-oj, forlasinte nur detruitan urbon, pendantajn ĉerkojn kaj freskojn en la ŝtonkavernoj, kiuj figurigas Nŭwa kaj Fuxi (Fuŝji), prapatrojn de la ĉina nacio, kaj prezentas la akrobatadon kaj festenon de la bo-oj, el tio ni povas iom ĝui la misteran nacian kulturon de bo-oj.


La televida filmo "Antikva Mistero" bone prezentas la pendantajn ĉerkojn de Ĉinio kaj konigas, kiel la sepulto disvastiĝis de oriente okcidenten kaj kiel migris la antikvaj bajjŭe-oj.

ESPLORO PRI LA NACIA ANIMSTATO

La sepulto estas respeguliĝo de la vivmaniero de homoj. En suda Ĉinio oni vivis en akvolando. La vivkondiĉoj determinis iliajn kutimon de la vivo kaj koncepton pri la vivo kaj morto. Longtempe oni kaptis fiŝojn kaj salikokojn en riveroj kaj prenis boaton kiel trafikilon. Boato estis grava en ilia vivo. Oni do imagis, ke ankaŭ en alia mondo boato estas nemankigebla. Eble ĝuste pro tio ili faris ĉerkon boatforma.

Sed kial ili pendigis la ĉerkon sur krutaĵo?

En la libro "Notoj de Kortego kaj Popolanoj" de Tang-dinastio (618-907) legiĝas: "Inter la nacimalplimulto ĉe Wuxi (Uŝji)-rivero estas tia moro: Kiam la gepatroj mortis, iliaj filoj metas la mortintojn en ĉerkon lukse faritan laŭeble, hakas kavernon sur rokmuŝo kaj per ŝnurego tiras la ĉerkon supren. Ju pli alten oni metas sian gepatran ĉerkon, des pli montriĝas ilia fileca amo." En Yuan-dinastio (1206-1368) s-ro Li Jing (Li Ĝing) diris en la libro



Surrokaj kavernoj por pendantaj ĉerkoj

"Notoj en Yunnan": "Sude de Yibin cirkulas moro: Oni metas la mortinton en ĉerkon kaj portas la ĉerkon sur montsupron. Kies ĉerko pli frue falas surteren, tiu estas benata." La gubernia kroniko de Gongxian-gubernio diras, ke post kiam bo-oj mortis, iliaj posteuloj pendigas la ĉerkon sur krutaĵo por sia nobliĝo kaj riĉiĝo.

El la supre diritaj citaĵoj videblas, ke la antikvaj bo-oj pendigis la ĉerkon sur krutaĵo, por ke la animo de la mortinto malsupren rigardu la hejmlokon kaj ne forgesu siajn posteulojn. Kiam la ĉerko falas, tio signifas, ke la mortinto revenas en la familion kaj liaj posteuloj fariĝas feliĉaj.

Oni diras, ke en Indonezio estas la simila moro ĉe iuj indigenoj. Por ke la animo de la mortinto iru al la paradizo, liaj posteuloj konkure pendigas la ĉerkon kiel eble plej alte. Ĉu ankaŭ la antikvaj ĉinoj tiel pensis? Kvankam ne legiĝas tiel klaraj diroj en la libroj, tamen la trovitaj materialoj montras, ke tiam oni kredis, ke kiam la animo de la mortinto enparadiziĝos, tio certe alportos feliĉon al iliaj posteuloj.

MIRINDA ARANĜO

Plej interesas, kiel la antikvuoj sukcesis fari la sepultadon sur krutaĵo en la stato, ke la produktaj fortoj estis tre malgrandaj. Pri

Shi Chengtai kaj lia Esperanta literaturo

EN Ĉinio estas esperantistoj, kiuj sin dediĉas al verkado kaj tradukado de Esperanta literaturo. S-ro Shi Chengtai estas unu el ili.

Komence de 1992, en la 2-a Ĉina Kongreso de Esperanto en Tangshan, mi konatiĝis kun s-ro Shi Chengtai. Nia mallonga interparolo havigis al mi multajn informojn pri Esperanta literaturo. Post la adiaŭo mi esperis, ke mi havos

okazon revidi lin. En oktobro 1992 mi iris al la gubernio Tailai de la provinco Heilongjiang (Hejlongĝjang) kaj vizitis lin.

Kiam ni renkontiĝis, ni tuj daŭrigis la interparolon nefinitan en Tangshan. Ni venis al la Tailai-a Lernejo de Surdamutuloj, kie li laboras kiel ĝia direktoro. Sur muro de lia oficejo pendas portreto de d-ro Zamenhof, sur librobreto troviĝas multaj leteroj kaj libroj, kaj sur lia skribotablo estas malneto —

li verkas artikolon.

Li parolis pri poemoj de Saint Jules Zee aperigitaj en "Literatura Mondo" en la 30-aj jaroj, pri originalaj noveloj verkitaj de Cicio Mar en la 40-aj jaroj, pri poemoj verkitaj de Armand Su en la 60-aj jaroj, pri la fama ĉina klasika romano "Songo en Ruĝa Buduaro" tradukata de Seimin, pri literaturaj atingoj de Julio Baghy, K. Kalocsay, Miyamoto Masao kaj Ueyama Masao, pri la beletra revuo "Penseo" en Esperanto kaj pri Guozhu (Gŭoĝu) kaj Wang Chongfang, kiuj sin dediĉas al la ĉina Esperanta literaturo. Li ŝajne montris al mi historian pentraĵon pri Esepranta literaturo.

Nerimarkite vesperigis. Shi Chengtai invitis min al sia hejmo. Ĉe la manĝotablo li rakontis al mi sian vojon de Esperanta literaturo.

Jam en mezlernejo li interesiĝis pri literaturo kaj lingvoj. Tiam li lernis la rusan lingvon kaj legis multajn rusajn verkojn. Ĉirkaŭ 1954 li aŭdis pri Esperanto. En 1956 li legis en gazeto artikolon,

tio ekzistas diversaj supozoj.

Iuj supozas, ke la antikvuloj portis ĉerkon laŭ kornica vojo. Tio estis ebla en iuj lokoj, tamen en multaj lokoj ne estis kornica vojo, kiel do ili sukcesis transporti la ĉerkon? Aliaj supozas, ke oni eble faris teramason kaj kiam la teramaso atingis certan alton, oni movis la ĉerkon supren laŭ la teramaso kaj post tio forigis ĝin. Tiu metodo estis taŭga por la kompare malaltaj krutaĵoj, sed kontraŭ abisma rivero oni povis fari nenion. Triaĵ supozas, ke oni eble portis la ĉerkon al alta loko okaze de inundo. Tamen en multaj lokoj malofte okazis inundo. Estas ankaŭ iuj, kiuj supozas, ke oni portis la ĉerkon sur krutaĵon helpe de skafaldo. Sed kion fari, se la krutaĵo estas tuj ĉe la rivero?

Fakte, la supre supozitaj metodoj ne estis realaj en ĉiuj lokoj. Kompare kun la supre diritaj ri-

medoj, estis kredinde, ke oni levis la ĉerkon alten per ŝnurego. En la libro "Notoj de Kortego kaj Popolanoj" ja legiĝas la simila metodo. Sed en tiu libro oni ne koniĝis, per kiu maŝino oni levis la ĉerkon. La esplorgrupo pri pendantaj ĉerkoj de Ĉinio sub la mekanisma fakultato de Tongji (Tongĝji)-universitato de Ŝanhajo opinias, ke la antikvuloj levis la ĉerkon eble per ŝnurego helpe de vindaso. Tio ja estis ebla. En 1978 oni trovis en antikva kupra minejo de Hubei-provinco akson de vindaso uzitan en la Militantaj Regnoj (475-221 a.K.). Historiaj verkoj konigas, ke vindaso estis vaste uzata jam en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.). Por konfirmi la supozon, la filmista grupo de "Antikva Mistero" faris vindason imite la antikvan kaj starigis ĝin sur la Fea Roko de

Longhu-monto, Jiangxi-provinco, tipa medio por pendantaj ĉerkoj. La 6-an de junio 1990 ili faris filmadon de supre sur la vindaso. La fakto montris, ke tiuspeca antikva maŝino povas supren levi ĉerkon.

La 87-jara maljunulino Wu Weidun (U Ŭejdun) de Gongxian-gubernio, Sichuan-provinco, certigis la supozon la 6-an de julio 1990. Ŝi diris: "Kiam mi estis dekkelkjara, mi aŭdis de pli-ol-90-jara maljunulo, ke oni levis la ĉerkon supren per vindaso, kiu estis starigita sur la montsupro. Oni ŝnuris la talion de homo kaj malsuprenigis lin por haki kavernon kaj meti la ĉerkon en la kavernon..."

Nun ŝajne malkovriĝis la mistero pri la ĉerkoj pendantaj sur krutaĵoj. ■

kiun skribis s-ro Chen Yuan, partopreninte en la 41-a UK en Kopenhago. En la sekva jaro li legis artikolon "Kio estas Esperanto" kaj en li ĝermis la deziro lerni Esperanton. Li sendis leteron al la Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL) laŭ la adreso donita en la artikolo kaj baldaŭ ricevis respondon. Li aĉetis lernolibron "Elementa Kurso de Esperanto" kaj eklernis. Tiam li estis lernanta la rusan lingvon, tial li trovis Esperanton facila kaj rapide progresis.

En 1958 li diplomiĝis el mezlernejo. Li havis malfacilon en la vivo kaj ne povis daŭrigi lernadon de Esperanto. En 1962 lia situacio iom boniĝis, kaj li rekomencis lerni Esperanton. Kvankam lia familio estis malriĉa, li tamen abonis la revuon EPĈ kaj aĉetis legolibron kun klarigoj de Tikos kaj nove eldonitan vortaron. Li iagrade posedis Esperanton kaj komencis legi Esperantajn literaturajn verkojn. Li aĉetis bulgarajn kaj polajn Esperantajn librojn, kaj poste havis "Esperantan Metrikon" verkitan de Guozhu, li ekstudis poezion.

En 1978 Ĉinio komencis praktiki la politikon de reformado kaj pordmalfermo. Ekde tiam pli kaj pli viglas la ĉina E-movado. Li lernis Esperanton 20 jarojn kaj finfine povis interparoli kun aliaj esperantistoj. Li komencis korespondi kun alilandaj esperantistoj. Li sendis leteron al s-ro Takeuchi Shigenori laŭ lia malnova adreso. La japana amiko abonis por li la revuon "Esperanto" kaj sendis al li Esperantajn librojn, inter kiuj estas novelaro "Mi Amas" verkita de Ueyama Masao. Shi Chengtai komencis multe legi Esperantajn literaturajn verkojn. Samtempe li aktive partoprenis en diversaj Esperantaj aktivadoj kaj vidis multajn mentorojn, kiaj Tikos, Zensto, Armand Su kaj Guozhu. Li fariĝis aktivulo de la movado kaj estis elektita kiel prezidanto de la Qiqihar-a Esperanto-Asocio.

Li komencis traduki kaj verki prozaĵojn, novelojn kaj poemojn, kiuj poste estis publikigitaj en

"Heroldo de Esperanto", "Monato", "Fonto", "Preludo" kaj aliaj Esperantaj gazetoj.


"Preludo" estis trimonata literatura revuo eldonita en Japanio. Preskaŭ en ĉiuj numeroj de ĝia fondiĝo en 1984 ĝis ĝia malapero en 1989 troviĝas liaj tradukoj plejparte de poemoj de Li Bai, Du Fu, Li

Qingzhao (Li Ĉingĝaŭ) kaj aliaj famaj poetoj de Tang- kaj Song-dinastioj. De 1988 ĝis 1990 li aperigis en "Monato" kiso-novelaron: "La Apostoliĝa Kiso", "La Porpaca Kiso", "La Mielmonata Kiso", "La Pardonpeta Kiso" kaj "La Porvenĝa Kiso", kiuj temas plejparte pri esperantista vivo.

En aŭgusto 1989, invitite de s-ano Osioka Moritaka, li vizitis Japanion, esploris la E-movadon en diversaj lokoj de Japanio kaj faris prelegon titolitan "Li Bai en Esperanto" en la Japana Esperanto-Instituto.

Por pli bone prezenti la klasikan ĉinan literaturon al alilandaj esperantistoj pere de Esperanto, li kaj s-ano Lin Liyuan kune fondis la monatan beletran revuon "Penseo" en Esperanto en julio 1990. La eldonanto estas Lin Liyuan, kaj la redaktoro estas nur li. Post sia apero la revuo akiris subtenon de multaj esperantistoj. S-ro William Auld, fama brita poeto, legis la 1-an numeron kaj tuj sendis al li du poemojn. Ankaŭ majstro de nia lingvo Gaston Waringhien sendis al li tri poemojn. Inter tiuj, kiuj donis subtenon al li kaj kunlaboris kun li, troviĝas ankaŭ Bakin, Ĵelezo, Lu Jianbo, Guozhu kaj Laŭlum.

La revuo "Penseo" aĝas pli ol 3 jarojn. Ĝi ne nur plenigis la blankon en la orienta Esperanto-



S-ro Shi Chengtai (maldekstre) kaj la aŭtoro

literaturo post la malapero de "Preludo", sed ankaŭ kulturis grupon da esperantistoj, por ke ili okupiĝu pri verkado kaj tradukado de Esperanta literaturo, kaj riĉigis la trezorejon de la ĉina Esperanta literaturo.

Shi Chengtai estas tre okupita. Krom redakti "Penseon", li havas ankaŭ multajn aliajn aferojn. En 1992 la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis "Poemojn de Armand Su", kies kompilintoj estis li kaj Guozhu. Nun li sin preparas por kompili prozaĵojn de Armand Su. Li ankaŭ ofte sendis kontribuojn al la redakcio de "La Mondo", organo de ĈEL, por prezenti al ĉinaj esperantistoj la Esperantan poezion.

Liaj libroŝrankoj abundas je Esperantaj libroj, el kiuj iujn li aĉetis en Ĉinio kaj aliaj landoj kaj aliajn liaj amikoj donacis. Li rigardas tiujn librojn kiel valoraĵojn kaj legis preskaŭ ilin ĉiujn. Nun li jam tralegis 5 volumojn da esoj de Gaston Waringhien. Lastatempe oni sendis al li librojn el Francio, Hungario, Nederlando kaj Japanio.

Kiam mi vizitis lin, li verkis novelon "Paro da Brilaj Okuloj". Li ride diris al mi: "Mi kontentiĝos, se mi povos eldoni novelaron kiel Cicio Mar antaŭ mia morto." Mi pensas, ke li certe realigos sian deziron. ■

Poemoj

ĈE MAŬZOLEO DE VERDA MAJO

Jen mi vizitas vin ĉe l' maŭzoleo
marmora, kiam oras la aŭtun'.
Kvietas la pinarboj kaj aleo,
lazur' muaras linde en lagun'.

La milita teruro en paseo
kaŝiĝas jam; karesas brile l' sun'
la teron, kiun tretis per pereoj
militkrimuloj spite al la pun'.

Sed vi batalis en la ter' por paco
kun ĉinoj, la spirito sankte buntas,
kaj l' amikec' en niaj koroj fundas.

Vi donis l' amon al popolamaso.

Nun, en la mondo ŝvebas via kanto,
mi kondolencas vin en Esperanto!

LA SUNO DE KANTONO

Vi estas sorĉa belulin' hontema,
vin kaŝis ĉiam post la nubtavolo.
Sopiras mi al via ĉarm' miena,

Tamen nur tremis via aŭreolo.
Subite, vi de nubkurten' eliras,
ekstazon donas al mi la favoro:

Via kares' ardanta varme giras
tra mia tuta korpo (de nordulo),
kaj via fajra amo min inspiras.

Galante mi balbutas sen skrupulo,
pasio cindriĝinta jam ekflamas.
Mi refreŝiĝas inter via brulo.

Kaj vi mucidajn tagojn pli balzamas...

POR KOMENCANTOJ

Malbelulino

“MALBELULINO” estas ŝia moknomo, kaj ŝia vera nomo estas Chunlan. Sed krom ŝiaj gepatroj, neniu vokis ŝin per ŝia vera nomo.

Fakte ŝi ne estas malbela. Ŝiaj okuloj grandaj, ŝia korpo svelta. Sed nur sur ŝia frunto estas denaska makulo en grandeco de monero. Jen kial oni nomas ŝin “malbelulino”. Ĉiuj ŝiaj samaĝaj kamaradinoj edziniĝis kaj iuj el ili jam havas infanon. Nur ŝi restis fraŭlino, kaj ŝiaj gepatroj estis maltrankvilaj pro ŝi.

Kiam ŝi estis 25-jara, oni svatis ŝin al junulo. Ĉi tiu pensis, ke ŝi estas bona, kaj la makulo neniom malhelpas lian amon. Ili gefianĉiĝis.

Iun tagon Chunlan kaj ŝia fianĉo estis lavantaj vestojn ĉe rivero. Subite ili aŭdis help-krion: knabo falis en la riveron, nur lia mano svingiĝis sur la akvo. “Vidu. Kion

fari?” Chunlan demandis la fianĉon.

“Sed mi ne scipovas naĝi, kaj la akvo estas tiel malvarma...”

“Pum”, antaŭ ol li finis la diron, ŝi jam demetis la vatitan veston kaj saltis en la riveron. Li estis surprizita.

Ŝi pene naĝis al la knabo kaj sukcesis atingi lin. Ŝi kaptis lian veston kaj tiris lin al la bordo. Sed la akvo estis tro malvarma, kaj ŝi perdis la konscion, tuj kiam ŝi es-



tis atingonta la bordon.

Kiam ŝi reakiris la konscion, ŝi trovis, ke ŝi kuŝas en varma ĉambro, kvankam kun haŭroj malsekaj. Ŝi murmuris: “Mi ankoraŭ vivas? Kiu savis min?”

“Mi,” forta vira mano premis ŝian. Ŝi vidis la fianĉon ĉe la lito. Sur ŝia vizaĝo aperis ĉagreno. “Ĉu vere?” Ŝi ne volis, ke li savu ŝin. Sed la fakto estas, ke la fianĉo saltis en la riveron kaj savis ŝin.

“Mi dankas vin, ke vi savis min,” ŝi ekploris. Ŝi deturnis sian vizaĝon kaj diris: “Foriru, mi ne amas vin.”

“Kio? Kion vi diras? Kial?” li ne komprenis ŝin.

“Vi povis savi plenaĝulon, sed ne volis savi la knabon, jen la kialo.”

Li perdis ŝian amon. La informo trakuris la vilaĝon kaj ŝi ricevis respekton de la vilaĝanoj. Neniu plu vokis ŝin “malbelulino”, kaj ĉiuj respektoplene nomis ŝin Chunlan.

Sed ŝiaj gepatroj estis maltrankvilaj pro ŝia faro. La samvilaĝanoj konsolis ilin: “Via filino ne estas malbela, ŝia koro brilas kiel oro. Estu trankvilaj!”

Post nelonge Chunlan ekhavis amaton. Tio tre ĝojigis ŝiajn gepatrojn. ■

ARMAND SU MORTIS

*Aŭtuna vento triste muĝis,
karan Armand jam portis morto!
Tamen delonge li sen vorto
kuŝe en lit' malsane fuĝis,*

kvankam dum "Tuta Lando Ruĝis",
voĉsonis lia kora kordo.
Aŭtuna vento triste muĝis,
karan Armand jam portis morto!*

*Sed li defie ne rifuĝis
antaŭ malica ŝerc' de sorto.
Rikoltis li en krea horto,
el Ĉin-kulturo kremon suĉis,*

liaj poemoj monde muĝis...!

* Dum la dekjara katastrofo de la Granda Kultura Revolucio la Kvarpersona Bando fanfaronis, ke tiam jam Tuta Lando Ruĝas.

SUR TAISHAN-MONTO

*Mi fine grimpas sur vi, Taishan-monto,
jen, ĉe la Suda Ĉielpordo staras.
Ĉirkaŭe nuboj ŝvebantaj muaras,
fariĝas al ĉielo jada ponto.*

*Forfluas tra paseo tempa ondo,
la historio ĉie kalendaras:
Poemoj de Li Bai, Du Fu rivalas,
inspiroj ŝprucas plu el via fonto;*

parad' imperiestra jam malhelas,
cipresoj oldaj drajas freŝe, vigle;
kaligrafiaĵoj sur rokokoj fabelas...*

*Incensoj antaŭ budhfiguroj pigre
fumas, al pinto kabla ĉaro celas.
Turismas ŝikaj gejunuloj migre...*

* Imperiestroj de diversaj dinastioj dum la ĉina historio vizitis Taishan-monton por kulti la ĉielon kaj la teron.

Monkolekto por Fondaĵo EPĈ-abono

Pro altiĝo de la kostoj de eldonado kaj sendado de "El Popola Ĉinio" ni reguligas de la pasinta jaro la abonkotizon kiel jene: la jara abono (inkluzive de sendokostoj) por la evoluintaj landoj kaj evoluantaj landoj respektive estas 26,00 kaj 14,40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloraj valutoj ŝanĝeblaj en usonajn dolarojn. Pro tio la plejmulto de niaj legantoj en la orienteŭropaj landoj, la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj la evoluantaj landoj, kiuj havas grandan malfacilon en ekonomio, ne povas plu abonon nian revuon. La reduktiĝo de abonantoj pli altigis la produktokoston de nia revuo kaj devigis nin malpliigi ekde ĉi tiu numero la kolorajn bildojn. Ĉi tie ni petas de niaj legantoj kompremon kaj pardonon.

Konsiderante ilian fortan

deziron daŭre legi nian revuon, ni decidis establi FONDAĴON EPĈ-ABONO, per kiu ni pagos la abonkotizon por iuj malnovaj legantoj kaj esperantistaj aktivuloj de la supre menciitaj landoj. Ni elprenos parton de la rentumo de Ghiselin-Fondaĵo de "El Popola Ĉinio" kiel bazan monsumon de FONDAĴO EPĈ-ABONO. (Tio tute konformas al la deziro de la belga samideano Charles Ghiselin, kiu testamentis, ke lia heredaĵo al EPĈ estu uzata por disvolvo de Esperanto.) Samtempe ni kore petas, ke esperantistoj de la landoj kun bonaj ekonomiaj kondiĉoj monofere al FONDAĴO EPĈ-ABONO por helpi la nepagipovajn samideanojn. Bonvenas eĉ malgranda sumo. Ni ĉiujare aperigos en nia revuo la nomon kaj ofersumon de ĉiuj donacintoj. Helpemuloj bonvolu sen-

di monon (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) al la konto A/C No. 71411749 je la nomo From People China (El Popola Ĉinio) ĉe Bank of China (Banko de Ĉinio). La adreso de la Banko de Ĉinio estas: Fuchengmennei Dajie, CN-100818 Beijing, Ĉinio. Sendante monon, bonvolu sciigi al ni pri la celo de la oferita mono kun kopio de la banka ĉeko. Oni povas sendi ankaŭ monbiletojn (usonajn dolarojn aŭ valutojn ŝanĝeblajn en usonajn dolarojn) rekte al ni en registrita koverto. La adreso estas: El Popola Ĉinio, P.O. kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.

Antaŭdankon pro via konsidero kaj monofero al FONDAĴO EPĈ-ABONO!

La Red.

Ponto de amikeco: Samar kand — Xi'an

LAŭ invito de la popola registaro de Lianhu-distrikto de la urbo Xi'an (Ŝji'an), Ĉinio, la delegacio de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco el Samar kando, Uzbekistano, vizitis la nomitan antikvan urbon, de kie komenciĝis la granda antikva Silka Vojo.

Xi'an kun 6 milionoj da loĝantoj estas ĉefurbo de la provinco Shaanxi (Ŝenŝji) situanta en la koro de Ĉinio, formiĝinta iam en la baseno de la Flava Rivero. Dum pli ol 1 100 jaroj Xi'an estis ĉefurbo de 11 dinastioj de ĉinaj imperiestroj kaj tiam Xi'an nomiĝis Chang'an, kiu estis unu el la centroj de la antikva ĉina kulturo. Tute prave oni diras: "Sen viziti Xi'an, ne eblas ĝuste kompreni la pasintecon kaj nuntempon de Ĉinio."

Malgraŭ tre streĉa laborplena programo de la 7-taga restado en Xi'an, ni sukcesis foje ekskursi tra

la urbo kaj viziti kelkajn famajn vidindaĵojn.

Sur la Sonorila Turo 36 metrojn alta aperis antaŭ ni ege bela panoramo de la urbo. Nur la fundamento de tiu ĉi turo estas konstruita el la blua briko kaj ĉio cetera farita el ligno. Malfacilas al ni imagi, ke tiel bone konserviĝis ĝis nun tiu ĉi originala konstruaĵo, kiu aĝas pli ol 600 jarojn.

Tre interesa kaj kortuŝa estis nia vizito al la Granda Moskeo de Xi'an, konstruita en neordinara (almenaŭ por ni!) stilo — kombino de la tradicia ĉina kaj islama arkitekturo. La konstruado de la moskeo komenciĝis, kiel tekstas la surskribo de la ŝtona plato, en 742 dum Tang-dinastio (618-907). Poste oni aldonis aliajn konstruaĵojn, kaj la moskeo fariĝis arkitektura komplekso. En tiu islama templo, kiu estas unu el la plej grandaj kaj bone konservataj en Ĉinio, imamo Ma Liangji (Ma Ljangĝji)

montris al ni ĉiujn vidindaĵojn de la moskeo kaj la antikvan manskribitan mapon, sur kiu estas markitaj la plej konataj urboj de la tuta mondo, kiel Medino, Mekko, Romo... kaj eĉ nia Samar kand.


Verŝajne, la plej konata historia vidindaĵo de Xi'an estas la Muzeo de Argilaj Militistoj kaj Ĉevaloj de la Unua Imperiestro de Qin (Ĉin)-dinastio (221 a.K. — 206 a.K.). En la grandega ekspozicia halo antaŭ ni kvazaŭ el sub la tero elkreskis la tuta ĉina armeo — kelkaj miloj da statuoj en natura grandeco kaj eĉ kun diversaj vizaĝmieno, plene armitaj kaj lokitaj en precizaj militistaj vicoj. Verdire ni estas treege impresitaj. Nin kaptis la sento, ke kvazaŭ dank' al iu maŝino de tempo, ni trafis en la malproksiman pasintecon. Tio estas nepriskribebla travivaĵo — tion necesas vidi kaj sperti mem.

Nin tre varme akceptadis gvidantoj de Lianhu-distrikto kaj ordinaraj homoj. Tiu ĉi distrikto situas en la nordokcidenta parto de Xi'an kaj estas granda industria, komerca kaj kultura centro. Antaŭ kelkaj jaroj sur la loko, de kie ĝuste startis la unuaj karavanoj, estis konstruita la granda skulpta komponaĵo "Granda Silka Vojo". Tiu ĉi vojo trapasis ankaŭ Samar kand.

Ni estis la unuaj reprezentantoj de Uzbekistano en Lianhu-distrikto, pro tio ne estas mirinde, ke niaj tagoj en Xi'an estis plenigitaj ekde frua mateno ĝis malfrua vespero per renkontiĝoj kun lokaj entreprenistoj, direktoroj de firmaoj kaj kompanioj. Ili ĉiuj esprimis sian intereson pri komerco,

(Daŭrigo sur p. 37)

La aŭtoro (la tria de maldekstre) kaj ĉinaj entreprenistoj



ESP-NOVAĴOJ

● Por festi la 40-an datrevenon de la fondiĝo de la Meksikia-Ĉina Amikeca Asocio, la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj kaj la Ĉina-Latinamerika Amikeca Asocio okazigis en la Pekina Kultura Palaco de Laboruloj ekspozicion de pentraĵoj pri la popolo kaj moroj de Meksikio. La 60 pentraĵoj, prezentitaj de la Meksikia-Ĉina Amikeca Asocio, estis faritaj de s-ro Alberto Beltrán, fama meksikia pentristo, simpatianto de Esperanto kaj unu el la fondintoj de tiu asocio. Ĉiu verko havas klarigon en la ĉina lingvo kaj Esperanto. S-ro Alberto Beltrán kaj s-ino Leonora Torres, esperantistino kaj prezidanto de tiu asocio, partoprenis la inaŭguron de la ekspozicio. Ili ankaŭ kunsidis kun samideanoj de ĈEL kaj EPC.

● La 8-an de junio 1993 la Yangzhou(Jangĝoŭ)-a E-Asocio de Jiangsu(Ĝjangsu)-provinco okazigis aktivadon por festi sian 5-an datrevenon. En la pasintaj 5 jaroj la asocio energie disvastigis kaj aplikis Esperanton. La Esperanto-traduka Servo de Yangzhou, fondita antaŭ 4 jaroj, disvolvis internacian interŝanĝon per Esperanto kaj ricevis bonan efikon. Nun la servo fariĝis la ekonomi-disvolva kompanio "Verda Stelo", kiu volas kunlabori kun ĉiu ajn Esperanta organizo aŭ individuo por disvastigi interŝanĝojn de kulturo, ekonomio kaj komerco, scienco kaj tekniko, turismo ktp. Adreso: Ekonomi-disvolva kompanio "Verda Stelo", n-ro 17, strato Dahongqiao, Yangzhou, 225002, Ĉinio.

● La Dua Mondkongreso de Esperantistoj-Handikapuloj okazos de la 8-a ĝis la 15-a de julio 1994 en la banloka urbo Františkovy Lázně, Ĉeĥio. Estos diversaj programoj: fakaj kunvenoj, diversgradaj studrondetoj, ekskursoj, vesperaj amuzigaj programoj ktp. Konkretajn demandojn kaj aliĝilojn sendu al: Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj, PK 63, 274 01 Slaný, Ĉeĥa Respubliko. Nun la Asocio havas 134 aktivajn

Ni bonvenigas Esperantajn artikolojn, Esp-novaĵojn kaj fotojn de ĉiu ajn Espeŝanta organizo aŭ individuo. Bonvolu sendi kontribuojn al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, Pekino, 100037, Ĉinio.

La Red.

membrojn, 284 pasivajn anojn kaj 321 subtenantajn favorantojn. La Internacia Klubo de E-Handikapuloj havas anojn en 15 landoj. Ili eldonas monatan gazeton "Informilo" pri la movado de E-Handikapuloj.

● La Tria Simpozio de Literatura Tradukado Internacia okazos en Havano de Kubo ekde la 23-a ĝis la 25-a de novembro 1993. Kadre de la Simpozio okazos la Dua Renkontiĝo de Literaturaj E-tradukistoj organizata de Esperanta Literatura Traduk-metiejo (ELT) kunlabore kun la Kuba Esperanto-Asocio kaj la E-redakcio de Radio Havana Kubo. Interesitoj povas sendi siajn konitaĵojn (nomo, adreso kaj telefono-numero) kaj kotizon al la Unio de Verkistoj kaj Artistoj de Kubo (UNEAC), per la adreso: 17 Y H, Vedado, Ciudad, Havana, Cuba.

● Pasporta Servo 1993 haveblas en la Esperanta merkato ekde nun. En la ĉi-jara listo aperas en 72 landoj pli ol 900 adresoj de gastigantoj, kiuj pretas akcepti vojaĝantajn E-parolantojn. La prezo ĉe UEA estas 24.00 NLG. Homoj en malpli riĉaj landoj povas eventuale aĉeti ilin malpli koste ĉe Landa Sekcio de TEJO aŭ ĉe Landa Organizado



La kovrilpaĝo de "Pasporta Servo 1993"

de Pasporta Servo. Se oni volas scii pli pri Pasporta Servo, oni povas peti informilon ĉe Pasporta Servo, p/a Rob KEETLAER, Postbus 2310, NL-1000 CH Amsterdam, Nederlando.

● "Printempo de Lingvoj" estas granda festo pri lingvoj okazinta de la 20-a de marto ĝis la 3-a de aprilo 1993 en Tuluzo kaj ĝis sudokcidenta franca regiono. De la komenco Esperanto-Kultur-Centro (EKC), en kunordigo de la Esperanto-asocioj en Tuluzo, partoprenis la preparadon de la festo. La inaŭguro okazis la 20-an de marto en la Unesko-Klubo, kie EKC prezentis Esperanton per ekspozicio kaj literaturo. Alia ekspozicio pri Esperanto estis prezentita en la Universitato de Tuluzo de la 20-a de marto ĝis la 2-a de aprilo. La 30-an de marto en la Loka Televido-stacio EKC kunordigis televidan debaton pri la lingvaj problemoj.



Ekspozicio de Esperantaj libroj kaj gazetoj en "Printempo de Lingvoj"

● En la Popola Altlernejo de Karlskoga, Svedio, de 1993.08.23 ĝis 1994.05.13 funkcias Eŭropokurso, kie la studentoj lernas pri Eŭropo en tri lingvoj: la sveda, la angla kaj Esperanto. La gvidanto de la Esperanto-fako de la lernejo esperas, ke la legantoj kontribuos per artikoloj, opinioj, sperto kaj travivaĵoj pri Eŭropo. La adreso: La Esperanto-Fako, Karlskoga Popola Altlernejo, Fakoj 192, S-691 24 Karlskoga, Svedio.

Granda olekampo en konstruado

MODERNA olekampo rapide levigas en Turpan-Hami-baseno, okcidenta Ĉinio.

Ĝi kun areo de 48 000 kvadrataj kilometroj estas unu el la sedimentaj basenoj malmulte prospektoritaj sur la ĉina kontinento.

Antaŭ 30 jaroj oleprospektorista grupo aktivadis sur tiu dezerta loko, tamen pro nesufiĉo de financaj kaj teknikaj fortoj oni boris 140 putojn kaj trovis nur 2 malgrandajn olekampojn.

Februare de 1991, oni denove turnis atenton al tiu loko. En la antikva urbo Shanshan fondiĝis komandejo por ole-ekspluato en Turpan-Hami-baseno. Samtempe kun tio 20 000 prospektoristoj de diversaj lokoj de Ĉinio sin direktis tien.

tis tien.

La Ĉina Ĝenerala Kompanio de Petrolo kaj Natura Gaso ellaboris gvidan principon konstrui altnivelan, multeprofitan olekamon en nova sistemo per nova tekniko, kaj post 2-jara penado oni venkis multajn malfacilojn kaŭzitaĵojn de la malnova sistemo, kiaj memhermetikeco, neracia strukturo kaj malbona funkcio, tiel ke formiĝis nova laborsistemo kaj aperis nova fizionomio en ekspluato de la olekampo.

Antaŭ ĉio la prospektorejo ne plu pasive atendis ekspluatantojn senditajn de la supera instanco, sed turnis sin al la tuta lando por elekti bezonatajn laborantojn. Nun tie laboras 13 mil laborantoj el 29 petrolaj entreprenoj, kiuj konsistigas 76.18% de la


totala nombro de la tieaj laborantoj.

Due, la prospektorejo efektivas la administradon ekzakte laŭ la projektoj kaj faras ĉion laŭ kontrakto, tiel ke formiĝis nova ekonomia ordo. Ĉiuj konstruaj projektoj estas efektivaĵoj laŭ la principo, ke “la projektoj estas deciditaj de la tasko kaj la kapitalo — de la projekto”. Ekde la komenco de la prospektorado, elspezo por la tieaj prospektorado, ekspluatado kaj konstruado ĉiam okupas 95% de la totala investo.

Laŭ la pensado: malgranda strukturo kaj granda funkcio, multaj kanaloj kaj malmultaj ĉeneroj, la olekampo, sin turnante al la tuta lando kaj tuta socio kaj helpate de la proksima Yumen-olekampo, aranĝas la garantiatajn sistemojn en produktado kaj vivo, tiel ke ĝi kreis por siaj oficistoj kaj laboristoj bonajn produktajn kaj vivajn kondiĉojn.

La ekspluatantoj el la Olekampoj Yumen, Huabei kaj Huazhong estas ĉefaj fortoj por ekspluati la olekamon. Sub la nova sistemo ili, kiel konkurantoj inter si, plurfoje kreas novajn rekordojn kaj tiamaniere puŝas la produktadon al nova nivelo.

Sur Turpan-Hami-baseno plurgeneraciaj laboristoj verŝis ŝviton. El la trovitaj 6 olekampoj, sur 4 oni boris putojn antaŭ 20 jaroj, tamen tiam oni ne trovis oleon pro la teknika postĝinteco. Por ŝanĝi la postĝintan fizionomion kaj gajni altan profiton la



eksploatantoj alprenis novajn rimedojn por kiel eble plej multe enkonduki novajn teknikojn kaj talentulojn. Ekde 1991 la olekampo invitis 176 unuarangajn enlandajn fakulojn kaj famajn profesorojn, 157 eksterlandajn fakulojn por teknika interŝanĝo en la olekampo. La olekampo dungis 230 fakulojn el 29 olekampo kaj 24 sciencaj institutoj de la lando por sia scienca esplorado, inĝeniera administrado, aplikado de novaj teknikoj kaj inspektorado sur la konstruejo, rezulte de tio al ĝi ne plu mankas sciencistoj kaj teknikistoj.

La olekampo organizis modelan grupon de laboristoj posedantaj novajn teknikojn kaj teknologiojn kaj kapablaj munti novajn ekipaĵojn, invitis fakulojn instrui la laboristojn per novaj teknikoj. Oni tiam alprenis internacie avangardajn borilpintojn PDC

kaj provis en 3 modelaj grupoj. La rezulto montris, ke ĉiu borilpinto PDC funkciis efike kiel 5 aŭ 6 ordinaraj borilpintoj.

La olekampo enkondukis kiel eble plej multe da avangardaj kaj praktikaj teknikoj de la olekampo de orienta parto de Ĉinio. Ĝi akceptis projekton kreitan en Ĉinio kun nivelo de la 80-aj jaroj kaj enkondukis internacie avangardan teknikon.

En la pasintaj 3 jaroj en la olekampo oni jam metis solidan bazon por la estonta disvolviĝo. Nun ĝi penas por atingi la celon en la venontaj 3 jaroj: jara produktokvanto — 3 milionoj da tunoj da petrolo kaj 600 milionoj da kubmetroj da natura gaso.

En Turpan-Hami-baseno oni malkovris 6 ole-gasajn strukturojn en mallonga tempo per malgranda investo. Shanshan-

olekampo jam finkonstruiĝis. Ĝi estas la unua olekampo en la baseno. Laŭ la plano sur la tero ĝi alprenis 24 novajn teknikojn. Fakuloj ekspertizis, ke 10 el ili atingis internacie avangardan nivelon kaj 9 enlande progresan nivelon.

Dank' al apliko de novaj teknikoj kaj projektoj radikale ŝanĝiĝis la tradicia labormaniero en la olekampo. En Shanshan-olekampo nun viglas novtipaj intelektuloj kaj lertaj fakaj laboristoj kun kompare alta kvalifikiteco. Nun reordigo de la laborprocesoj de la olekampo kaj funkciado de la ĉefaj instalaĵoj estas teleregataj. La taga produktokvanto de la olekampo superis 1 500 tunojn, dum la nombro de ĝiaj administrantoj estas nur dekono de tiu de la similaj olekampo en la lando. ■

AMUZOJ

Ne haku tigran haŭton (Humuraĵo)


Tigro kuris for kun la patro de knabo en sia buŝo. La filo kuratingis kaj intencis mortigi la tigron por savi la patron.

La patro en la tigra buŝo kriegis: "Mia filo, se vi mortigos la tigron, prefere haku ĝiajn piedojn, ne ĝian haŭton. Laŭ lastatempa prezo tigra felo estas tre valora."

(El "Legu kaj Ridu", Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1992)

Anonco pri konkurso de EPĈ-legado

La ĉi-foja konkurso de EPĈ-legado okazos en la venonta monato. Ricevinte memoraĵojn post la konkurso de Aeolus-pokalo okazinta en 1992, iuj legantoj kun ĝojo skribis al ni, ke ili tre interesiĝas pri la konkurso. Germana leganto s-ro Josef Kondor skribis: "Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis belegan kaj valoran ĉinan filatelaĵon senditan de vi, kun bildo de ruĝa, flava kaj blua ŝargaŭtoj sur speciala koverto kaj poŝtkarto. Akceptu mian tutkoran dankon pro la distinga donaco!" Pola leganto s-ro Andrzej Gielert diris: "Lastafoje mi



ricevis vian 3-an numeron. Koran dankon! Mi legis, ke mi sukcesis en via konkurso de Aeolus-pokalo kaj ricevis aŭtomodelon, kiu estas bela kaj interesa kaj staras sur la unua loko en mia benko. Mi estas tre dankema al vi kaj ankaŭ fiera, ke mi gajnis duan lokon en via konkurso. Mi estas via fidela leganto kaj partoprenos en ĉiuj viaj konkursoj." Iliaj vortoj estas ĝojigaj kaj ni daŭre okazigos la konkurson de EPĈ-legado.

Ĉi-foje ni preparas memoraĵojn, kiel ĉina kaligrafiaĵo, ĉinstila pentraĵo, miniatura simio farita de s-ro Cao Yijian (Caŭ Jiĝjan) kaj gluita ŝtofaritaĵo farita de s-ino Zhang Qi (Ĝang Ĉji), pri kiuj ni jam raportis en la 3-a kaj 5-a numeroj.

Pri la detaloj legu la sekvantan numeron, en kiu ni aperigos la demandaron por la konkurso.

La Red.

CHANGDAO

Teksto de KONG XIANHAO

Fotoj de DA WEI

Se vi ŝipe veturas norden el Penglai-haveno de Yantai, Shandong-provinco, vi atingos Changdao-gubernion dekojn da minutoj poste.

La gubernio ĉe la limo de Bohai-marĉo kaj la Flava Marĉo konsistas el 32 insuletoj. Ĝi kovras 56 kvadratajn kilometrojn kaj havas 43 000 loĝantojn.

La gubernio estas riĉa je marproduktaĵoj kaj vidindaĵoj. Tie kreskas 138 specoj da moluskoj kaj algoj kaj 30 specoj da fiŝoj kaj salikokoj. El ili plej famas pektenoj, haliotoj (*Haliotis gigantea*),

holoturioj, ekinoj k.a. La gubernion favoras varmeta vintro kaj agrabla somero. En ĝi ne mankas groteskaj rokoj kaj rifoj kaj ĉarmas pejzaĝoj. Ĝi estas unu el la gravaj pitoreskejoj de Ĉinio kaj ĉiujare akceptas milionon da turistoj.


De la pasintaj jaroj la insulanoj kulturis laminariojn, pektenojn kaj haliotojn en granda nombro. En 1992 la pokapa produktovaloro de Changdao atingis 15 600 juanojn (ĉ. 5.7 juanoj egalas al unu usona dolaro) kaj inter la gubernioj de Ĉinio Changdao okupis la unuan lokon tiuflanke.

Fiŝistoj



Kulturado de haliotidoj





Bredejo

Pektenoj




Bredado de haliotoj



Bambuoj verdigas Zhejiang

Teksto de XU HUADANG

Fotoj de LIU SIGONG



Bambuaj trunkoj transportotaj aliloken

BAMBUOJ, fortikaj kaj graciaj, kreskantaj sur montoj kaj ĉe riveroj, verdigas la teron. En Ĉinio bambuoj produktiĝas ĉefe en la sudo. Statistiko montras, ke Ĉinio havas pli ol 3 milionojn da hektaroj da bambuoj de pli ol 400 specioj kaj estas unu el la landoj kun plej multaj specioj kaj kvanto de bambuoj.

La sudorienta ĉemara Zhejiang(Ĝeĝjang)-provinco estas unu el la ĉefaj bambu-produktejoj. Tie troviĝas 486 000 hektaroj da bambuoj de pli ol 200 specioj. Iuj bambuoj estas altaj kiel arboj, aliaj malaltaj kiel arbedoj, triaj kiel rampuloj kaj kvaraj kiel lianoj. Ili estas vulgare nomataj bambuoj kvadrataj, makulaj, ombrelvergaj, budhoveventraj...

La Zhejiang-anoj ŝatas bambuon ne nur pro ĝiaj modesteco kaj nefleksebleco, sed ankaŭ pro ĝia forta vivipovo kontraŭ la malseka kaj varmega klimato en la sudo. La plej grava valoro de bambuo estas protekti la ekologi-


an medion kaj verdigi la teron.

En la suda parto de Zhejiang, ambaŭflanke de Oujiang-(Oŭĝjang)-rivero, etendiĝas bambuaroj. Ili kvazaŭ reto fiksas sablon, malhelpas erozion kaj tiel protektas la digojn. En Tianmumontaro en okcidenta Zhejiang, ĉie kreskas bambuoj, kiuj radikas tiel profunde en la tero, ke la sablo estas firme fiksita. Pro tiu kaŭzo tie la montoj verdas kaj la akvo klaras.

La valoro de bambuo ankaŭ kuŝas en ĝia taŭgeco por dekorado. En Zhejiang multaj pitoreskejoj estas nedisigeblaj de bambuoj. La fama pitoreska urbo Hangzhou (Hangĝoŭ) allogas multajn vojaĝantojn en- kaj eksterlandajn per la belaĵoj de la Okcidenta Lago. Alia nova pitoreskejo en Hangzhou estas la Ŝtata Bambucentro, kie kolektiĝas pli ol 100 specioj da bambuoj, inkl. de la altvaloraj. Ankaŭ la subdistrikto Anji (Anĝji) estas bona loko por ĝui bambuojn. Tie la bambuaro estas vualita de diafana nebulo en mateno, lumita de oraj radioj en vespero kaj duŝita de milda

pluveto en printempo.

Pri la amo de Zhejiang-anoj al bambuo menciindas ilia travivaĵo. La vilaĝo Yinjiashan (Jingĝaŝan) de Lin'an-gubernio famas kiel "bambusa vilaĝo" en la provinco. Tamen en la komenco de la 60-aj jaroj la vilaĝanoj pereigis pli ol 30 hektarojn da bambusoj por multe kreskigi grenon. La bambusa monto fariĝis sterila. Terure perdiĝis akvo kaj tero, rezulte okazis diluvo kaj interrompiĝis la fluo de fontakvo. Tio kaŭzis, ke multaj kampoj rikoltis neniom. Post profunda konsidero la vilaĝanoj decidis ree planti bambusojn. Krom rekultivi la pli ol 30 hektarojn da bambusoj, ili ankaŭ plantis bambusojn ĉie sur la dezerta monto. Nun la vilaĝo kun 492 anoj havas 160 hektarojn da bambuoj. Bambuo estas rigardata kiel protektanta dio kaj financa fonto de la vilaĝo. Tie la kvanto de hakitaj bambuaj trunkoj estas 30 000 kaj la jara produktokvanto pli ol miliono da kg. Oni starigis bambuan prilaboron kaj suriris la vojon de riĉiĝo. 90% de la familioj konstruis novajn etaĝdomojn, 60% aĉetis ko-



Prilaborado de bambuoj

lorajn televidilojn, kaj nemalmultaj aĉetis eĉ aŭtojn.

El la disvolviĝo de bambuoproduktado la Zhejiang-anoj iom post iom ellaboris sciencajn metodojn de kultivado kaj administrado, kiaj scienca sterkado, ĝustatempa akvumado, racia hakado, prevento kaj kuracado de plantmalsanoj, mortigo de fiinsektoj, enkonduko de novaj bambuspecioj kaj starigo de nova bambuaro. Maji (Maĝji)-vilaĝo de Anĝi-gubernio estas ekzemplo de sinteza ekspluatado de mez-kaj malaltprodukta bambufonto en la ŝtata agrikultura esplorado. En la pasintaj jaroj, aplikante sciencajn teknikojn, la vilaĝo resumis la sperton "rezervi bambuŝosojn dum malaltprodukta jaro kaj kultivi bambuojn dum mezprodukta jaro", kaj tiel prosperigis la malaltproduktajn bambuajn kampojn. Nun la vilaĝo disvastigis tiun sperton, ke la tuta gubernio produktis bambuojn ĉiujare je 5 594 tunoj pli multe.

Krome, oni starigis rigoran principon por administri bambuan produktadon. En Wenshan-

subdistrikto de Shaoxing- (Ŝaŭŝing)-gubernio oni praktikis respondecan principon pri bambua produktado, per tio oni efektivigis la principon por administri bambuaron. La bambuprotekta grupo serioze kontrolis la hakadon kaj transporton de bambuoj kaj tiel garantiis la bambuan produktadon.

En la sudo de Ĉinio, dank' al la milda kaj varma klimato konvena al la kresko de bambuoj, jam deantikve oni kultivas bambuojn en Ĉinio. La bambua plektado kaj prilaborado jam fariĝis parto de tradicia ĉina kulturo, honorita kiel "bambua kulturo". Fruĝ en la primitiva socio oni faris el bambuo pafarkon kaj sagon por ĉasi. Jam en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770 a.K. — 221 a.K.) oni sciis plekti bambuan korbon kaj maton kaj fari bambuan slipon por skribo. En la Orienta Han-dinastio (25-220) bambuo fariĝis materialo por fari paperon. Poste plimultiĝis diversaj bambuaj vivnecesajoj, kiaj seĝo, lito, tablo, mato, kurteno, korbo kaj ĉapelo. Iuj lertuloj far-

is el bambuo diversajn muzikajn instrumentojn, kiaj fluto, *ŝjatu-o* kaj *ŝeng-o*. Pro tio en Ĉinio muziko estas konata ankaŭ kiel "sono de bambuaj instrumentoj".

En Zhejiang-provinco artistoj faris abundajn bambuajn metiartaĵojn, inter kiuj la bambuaj plektaĵoj estas la plej superaj en Ĉinio. La provinco havas 26 grandajn bambuplektajn entreprenojn, inter kiuj la Shengxian- (Ŝengŝjan)-a Metiarta Bambuplektejo estas unuaklasa, kun tre spertaj artistoj. Ili faris el bambuo diversajn animalojn tiel delikatajn kaj versimilajn, ke oni ekŝatas ilin eĉ la unua vido. En la jaro 1979 la de ili farita bambua plektaĵo "monta aglo" venis en la Blankan Domon kiel donaco al la prezidento de Usono. La bambuplektejo havas 3 000 laboristojn plejparte kamparajn. En la ĉefsezono de kamplaboro ili sin okupas pri terkulturo, kaj en la morta sezono pri plektado de bambuoj, kiujn ili mem produktis. Multaj bambuaj metiartaĵoj eksportigas al aliaj landoj. Pro tio, ĉu ni povus diri, ke estas bambuoj, el kiuj oni plektas por Zhejiang-provinco pardon al la mondo? ■



Bambuoj sur monto


Bambuaro





Bambuaj trunkoj transportataj aliloken

Flegado



Starigi novan scienc-teknikan sistemon

de DAI WEN

EN la lastaj jaroj de la 20-a jarcento la ĉina scienc-teknika sistemo eniros en ŝlosilan periodon de sia reformado, kies ĉefa enhavo estas ŝanĝi la disiĝon de sciencoj kaj teknikoj de ekonomio kaj starigi ilian striktan rilaton kaj novan scienc-teknikan sistemon konforman al la disvolviĝo de la socialisma merkata ekonomio, laŭ kiu sciencoj kaj teknikoj kiel la unua produkta forto povas plene disvolviĝi kaj kiel eble plej multe ludi sian rolon en la socialisma konstruado.

La reformado en la pasintaj 8 jaroj rompita la altgrade koncentran administran sistemon de Ĉinio. La merkato ludas pli kaj pli gravan rolon en sciencoj kaj teknikoj kaj en sia administrado kaj multe malpliigis la disiĝon de sciencoj kaj teknikoj de ekonomio.

Nun sur la ĉeftero de Ĉinio 70% de la sciencistoj aktivis sur la ĉefa kampo de la naci-ekonomia konstruado. En 1992 la scienc-esploraj institutoj kaj altlernejoj de la lando starigis fakajn rilatojn kun 22 000 ŝtataj entreprenoj. Ili transdonis 8 700 scienc-teknikajn fruktojn al la entreprenoj kaj kune kun la entreprenoj plenumis 5 000 projektojn, kaj samtempe

sciencoj kaj teknikoj mem multe plifortigis: La nombro de la sciencistoj kaj teknikistoj pligrandiĝis, iliaj esploraj fruktoj plimultiĝis kaj la fiksa kapitalo de la scienc-esploraj institutoj kreskis je 84.4% kompare kun tiu en 1985.

Tamen la reformado de la scienc-teknika sistemo ankoraŭ ne radikale ŝanĝis la disiĝon de sciencoj kaj teknikoj de ekonomio. La disiĝo daŭre malhelpas la ekonomian disvolviĝon de Ĉinio. Ankoraŭ ekzistas serioza malkoncentriĝo kaj ripetiĝo de la establoj de sciencoj kaj teknikoj. Sciencistoj kaj teknikistoj ankoraŭ ne povas plene disvolvi sian talenton.

En majo 1993 okazis la Tutlanda Konferenco pri Scienc-teknika Laboro. S-ro Song Jian (Song Ĝjan), prezidanto de la Ŝtata Scienc-teknika Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko, proponis gvidan principon por profundigi la reformadon en sciencoj kaj teknikoj, t.e. "teni unu parton kaj liberigi ĉiujn ceterajn". Oni opinias, ke tio estas ŝlosilo por kombini sciencojn kaj teknikojn kun la ekonomia konstruado.

La tiel nomata "teni unu parton" signifas, ke la ŝtato protektu elitajn grupojn pri esplorado de bazaj sciencoj, altaj teknikoj kaj gravaj scienc-teknikaj projektoj. La tiel nomata "liberigi ĉiujn

ceterajn" signifas liberigi kaj vigligi grandnombrajn ekspluatajn kaj servajn scienc-teknikajn establojn kaj puŝi ilin al la merkato pere de la struktura reordigo kaj malkoncentro de sciencistoj kaj teknikistoj.

Sciencistoj kaj teknikistoj opinias, ke la principo proponita de s-ro Song Jian estas makrorimedo por reformado kaj en praktikado de tiu principo oni devas konduki 85% de la sciencistoj kaj teknikistoj al la kampo de scienca ekspluato bezonata de la ekonomia konstruado. Tio estas utila kaj al la transformado de scienc-teknikaj fruktoj en produktan forton kaj al elitiĝo kaj vigliĝo de grupoj de baza esplorado. Juna biologo kaj profesoro de la biologia fakultato de la Pekina Universitato, s-ro Chen Zhangliang (Ĉen Ĝangliang) prave diris, ke por tiel granda lando, kiel Ĉinio, la nuna grupo de baza esplorado estas tre malgranda, sed konsiderante tiel malgrandan monsumon por scienc-esplorado, la grupo ŝajnas tro granda. Nun ĉiuj laboras sur la kampo de baza esplorado, ricevas nur po unu bovlon da kaĉo kaj fine devas suferi malsaton. El tio oni vidas, ke la gvida principo proponita de s-ro Song Jian estas bona vojo por la sciencistoj kaj teknikistoj de Ĉinio.

En la reformado de la scienc-teknika sistemo ekzistas du gravaj problemoj atentataj de la sciencistoj kaj teknikistoj de Ĉinio, t.e. kiom da mono la ŝtato asignas al scienc-teknika esplorado kaj kiamaniere la ŝtato plibonigas la labor- kaj vivkondiĉojn de la sciencistoj kaj teknikistoj.

Parolante pri la ŝtata investo por sciencoj kaj teknikoj, s-ro Song Jian diris, ke en la nuna tempo, kiam la financa situacio de nia lando estas streĉa, ni devas daŭre reguligi investon, starigi kaj kompletigi la multavolan sistemon, ebligantan al la tuta so-

(Daŭrigo sur p. 37)



S-ro Liu Bojun

Interesoplenaj pentraĵoj de s-ro Liu Bojun

de CHEN SI

LA nomo de Liu Bojun estas konata en la pentrista rondo de Ĉinio. En la komenco de la kvardekaj jaroj li jam famiĝis pro sia elstara pentra talento, sed dum postaj multaj jaroj li silentis. Duonjarcento pasis, kaj li reaperis kun siaj pentraĵoj karakterizitaj per densa loka gusto. En junio ĉi-jare li ekspoziciis siajn pentraĵojn en la Ĉina Belarta Domo, donante freŝecon al la pentrista rondo.


En la jaro 1921 Liu Bojun naskiĝis en pitoreska urbeto de Sichuan(Siĉuan)-provinco. Lia avo ŝategis pentri kaj estis konata en la urbeto. Estis multe priparolata la rakonto, ke lia avo speciale pentris pejzaĝon kaj donacis ĝin al sia edziniĝonta filino kiel doton. La patrino de Liu Bojun lertis en skizo, kaj la patro estis bona pentristo kaj tre ŝatis pentri orkideon. Jam en la infaneco Liu Bojun heredis la virton de ĉinaj intelektuloj vivi honeste kaj gardi sian purecon kaj ekamis pentrarton.

Estas karikaturo, kiu puŝis lin en la pentristan rondon. Kiam la japana armeo tiranis en Ĉinio komence de la kvardekaj jaroj, same kiel aliaj ĉinoj, Liu Bojun sentis sian devon defendi la patrolandon. Li pentris seriojn da karikaturaj, kiuj estis ŝatataj de popoloj. En la serio "Rigida Lernado", li kritikis iujn junulojn, kiuj nur scias lerni, kiam la patrolando suferas. Edifite de iu instruisto pri belarto, li decidis aliĝi al la enira ekzameno por belarta kolegio. Kvankam li malfruis al la ekzameno pro trafikaj malfaciloj, tamen per siaj lerta pentrarto kaj elstara talento, li estis escepte akceptita kiel aŭskultanta studento de la Ŝtata Arta Kolegio de Chongqing en Sichuan-provinco, la plej renoma arta kolegio. Post duonjaro, li fariĝis studento de la kolegio.

Longe li vivis en la fermita urbeto, kaj en la nomita kolegio li soife legis librojn pri pentrado kaj kolektojn de famaj pentraĵoj en la biblioteko. El la legado li sentis la profundecon kaj vastecon de la ĉina pentrarto.

Dank' al siaj peniga studado kaj saĝeco li rapide progresis en pentrado. Dum la benefica vendado, liaj pentraĵoj estis konataj de pli kaj pli multaj homoj kaj grandkvante disvenditaj. Pro tio li famiĝis en la kolegio kaj debutis kiel promesplena stelo en la pentrista rondo. S-ro Pan Tianshou, unu el la plej famaj majstroj de la ĉinstila pentrarto, alte taksis lin kaj akceptis lin kiel sian disĉiplon. Instruate de la fama majstro, li enpaŝis en novan staton de pentrarto. En 1940, li diplomitiĝis el la kolegio kaj s-ro Pan Tianshou faris escepton okazigi ekspozicion de liaj pentraĵoj en la pitoreska urbo Huzhou en Zhejiang-provinco. Multaj famaj literaturistoj kaj artistoj vizitis la ekspozicion. Tio estis tre influa en la socio. Post kelkvara soldata vivo, li revenis sian hejmlokon por perfektigi sian pentrarton kaj laboris kiel instruisto.

S-ro Liu Bojun studas liberstilan pentradon de floroj kaj birdoj kaj ankaŭ ekzercas fingran pikturon. La ĉinstila pentrarto dividiĝas en du sektorojn de delikatlinia kaj liberstila pentrado. Per la unua oni precize kaj detale figuras homojn aŭ objektojn, kaj per la dua oni montras la internan temperamenton kaj animstaton de homoj. Tiuj, kiuj bone konas la pentraĵojn de Liu Bojun, trovas, ke kvankam en liaj verkoj mankas la antaŭa libera kaj senĝena kreado, tamen esence en la pentraĵoj enestas simpleco kaj klareco. Ekz. en la pentraĵo "Maljuna Umeo" la zigzagaj branĉoj plenaj de kuntiraj fortoj ŝajnas vivo, kiu estas longtempe sufokata kaj tordata, dum la flavaj




La ĉinstila pentraĵo "Daba-monto en Printempo"



La ĉinstila pentraĵo "Maljuna Umeo"



La ĉinstila pentraĵo "La Naturo"



umefloroj sur la pinto de la branĉoj elspiras freŝecon kaj elegantecon, tenante sin en ekvilibro kun la branĉoj. En la verko "Demandoj al la Ĉielo", aglo sur ŝtono disetendas siajn flugilojn, kun levita kapo kaj demandantaj okuloj esprimas la senliman esploradon de la pentristo pri la homa vivo kaj arto. Tamen en la vivo ne ĉiam estas penlaboro, kaj post longa vojaĝo oni bezonas ripozon. La pentraĵo "La Naturo" montras kvietan atmosferon: folioj, torusoj kaj floroj de lotuso prezentas la kvieton de la naturo, dum silente fluganta ruĝa libelo alportas al la bildo vivecon kaj intereson.

La pentraĵoj de s-ro Liu Bojun distingiĝas per kompakta skizo, simplaj strekoj, malvarmaj tonoj kaj variantaj koloroj kun la nigra kiel la ĉefa. Ĉio ĉi montras stilon de vera majstro.

Liaj pentraĵoj prezentas al homoj pripenson kaj komprenon de iu Sichuan-ano pri la homa vivo kaj la naturo. ■



La cinstila pentraĵo "Demandoj al la Ĉielo"

BUDHISMA kulturo estas nedisigebla parto de la ĉina kulturo. Post kiam budhismo konatiĝis en Ĉinio, aperis multaj budhismaj montoj grandaj kaj malgrandaj tra Ĉinio. Inter ili la plej famaj estas Emei, Wutai, Putuo kaj Jiuhua.

Oni ne povas traŝrigardi la kvar montojn en dek tagoj, tial mi proponas viziton al Emei-monto.

Vi unue venos al Pekino kaj tie vizitos 3 tagojn. Poste vi flugos al Chengdu, kaj de tie trajne veturos al Emei-monto.

La monto etendiĝas vaste, kaj vi vizitos nur la ĉefan parton de la monto, nome la Grandan Emei.

Atinginte la monton, vi tuj sentos tute novan etoson plenan de sankteco, pureco kaj senlimeco de religio. En kvieta verda ombro ŝtona vojo spirale surprizas ĝis la montosupro. Tie estas bona loko por memkulturo. Ne estas mirinde, ke en la antikveco oni multe konstruis sur la monto. En Ming- kaj Qing-dinastioj (1368-1911) tie estis ĉirkaŭ 100 temploj grandaj kaj malgrandaj. Nun tie restis ne tiom multe da temploj, tamen la incensado ankoraŭ estas vigla. Laŭvoje vi vidos, ke multaj venintaj de malproksimaj lokoj pie adorkliniĝas kaj preĝas incensante.

Unue vi vidos la pordon de Emei, la templon Baoguo. En tiu templo konstruita en 1614 staras tre valora bronza pagodo, 14-etaĝa kaj 7 m. alta. La pagodo estis farita en Ming-dinastio. Sur la pagodo estas pli ol 4 700

Budhisma sanktejo Emei-monto

de GUAN LI

statuoj kaj la kompleta kolekto de "Sutro Huayan". Pro tio la pagodo ricevis la nomon Huayan.

Grimpante pli supren de Baoguo-templo, vi vidos la Dekmiljaran Templon, unu el la ĉefaj temploj sur la monto. La templo estis konstruita en Jindinastio (265-420). Antaŭe la templo havis 7 kortojn tre imponajn, kaj poste ĝi spertis plurfojn detruojn kaj rekonstruojn. Nun la templo havas 2 kortojn rekonstruitajn en 1953. En la templo estas bronza budho Samantabhadra. La budho sidas sur blanka elefanto kun 6 dentoj. La tuta statuo altas 7.3 metrojn kaj pezas 62 tunojn. La delikate skulptita budho vekas admiron.

Hongchunping estas alia templo sur la monto. Proksime de la templo kreskas 1 500-jara arbo kun prospera foliaro. La templo estis konstruita en Song-dinastio (960-1279) kaj riparita en la postaj dinastioj. En la templo estas lotus-forma lanterno en alto de 2 metroj. Sur la lanterno gravurigiĝis 7 drakoj kaj centoj da budhoj. La antikva templo sidas sub la monto Tianchi. La templon krampas kontinuo da montoj kaj ambaŭflanke estas profun-

daj valoj kun fluo. La densa arbaro ombrelas super la loko, ke la loko fariĝis bona somerumejo.

Emei-monto altas 3 077 metrojn. Ĝia supro estas nomata Ora Supro. Tie estas Puguang-templo, kaj apud la templo estas la belvidejo Duguangtai por rigardi nuban maron kaj sunleviĝon. En serena posttagmezo, kiam oni

staras sur la belvidejo, oni povas vidi kolorajn lumringojn super nuba maro, nomatajn "Budha Nimbo". Oni ankaŭ povas vidi sian figuron en la mezo de la nimbo. Sed la apero de lumringoj estas decidita de vetero, sekve ne ĉiuj turistoj povas vidi la spektaklon. Mi esperas, ke vi ĉiuj havos bonŝancon.

Post vizito en Emei-monto vi revenos al Chengdu kaj de tie veturos per aŭto al Leshan por rigardi la gigantan budhon. La fama budho estis skulptita sur monto ĉe riverbordo. Laŭdire la skulptado de la budho estis iniciatita de bonzo Haitong en Tang-dinastio (618-907). Li ofte vidis ŝippereon en la torenta rivero kaj ekhavis la deziron skulpti budhon, por ke la budho bridu la demonojn en la rivero. La skulptado daŭris de 713 ĝis 803 p.K. La budho altas 71 metrojn, same kiel la monto. Liaj piedoj atingis la akvosurfacon de la rivero. Lia piedo estas tiom granda, ke sur ĝi povas sidi cent homoj. Ĉu ĝi estas la plej granda budho en la mondo?

Post dektaga vizitado vi flugos de Chengdu al Ŝanhajo por flugi hejmlanden. ■

Moroj ĉe la Silka Vojo

Teksto de QIU HUANXING

Fotoj de LU ZHONGMIN

DUNHUANG situas en Gansu-provinco, nord-okcidenta Ĉinio. Ĝi estis grava urbo sur la antikva Silka Vojo. Ĝia Mogao-ŝtonkavernaro estas fama antikva trezorejo. Ekde 366, oni sinsekve fosis ĉi tie pli ol 1 000 ŝtonkavernojn. En Mogao-ŝtonkavernaro konserviĝas nun 2 400 koloraj statuoj de budhoj, bodisatvoj, ĉielaj reĝoj kaj herkuloj kaj la 45 000-kvadratmetra freskaro rakontas ĉefe pri budhismaj sutroj.

Arto ja estas destinita por speguli la realan vivon. Dank' al tiuj religiaj artaĵoj, oni konis la vivon de la tiamaj popolanoj kaj ties morojn ĉe la Silka Vojo en malsamaj dinastioj, kiaj terkulturo, domkonstruo, ĉasado, paŝtado, muelado, buĉado, kuirado, fermentigado, nupto, funebra ceremonio, festeno, dancado kaj teatro.

ALTEBENAĴAJ AĈNATEROJ

La freskoj de la ŝtonkavernaro n-ro 455 pentritaj en Tang-dinastio (618-907) temas ja pri budhisma paradizo, sed fakte sur ili oni vidas la agrikulturan produkton en la Koridoro Okcidente de la Flava Rivero. Tie oni plugas teron per 2 bovoj, rikoltas per ŝoveliloj kaj draŝas sur disgrajnigiloj. Sur fresko vidiĝas, ke kamparanino balaas per blanka balailo farita el aĉnateroj (*Achnatherum splendens*), kiuj kreskas en Gansu-provinco.

Fortikaj, elastaj, brilaj kaj puraj, aĉnateroj estis vaste uzataj en la antikveco; el ili oni plektis pajlosandalojn kaj kirasojn. El la rompitaĵoj de budhaj statuoj de Mogao-

ŝtonkavernaro, ni vidis ankaŭ la aĉnaterojn. En la antikveco oni faris el tiuj herboj ankaŭ la budhaj statuojn.

Hodiaŭ Dunhuang-anoj ankoraŭ vaste uzas tiujn herbojn. Kiam oni konstruas domojn, oni metas aĉnaterojn anstataŭ tabuloj sub tegolojn, por ke la tegmentoj estu solidaj kaj efikaj kontraŭ frosto. Terlitaj matoj kaj korboj el aĉnateroj estas blankaj kaj belaj kiel artaĵoj. Oni ŝnurumas moligitajn aĉnaterojn por jungado kaj faras eburajn mang-bastonetojn el dikaj aĉnateroj.


KLINSALUTI SOVAĜAJN ANSEROJN EN GEEDZIĜA CEREMONIO

La fresko de la ŝtona kaverno n-ro 455 prezentas la nuptan scenon de Tang-dinastio: komence de la nupto oni ludas muzikilon kaj dancas. Kaj la novgeedzoj klinsalutas paron da sovaĝaj anseroj. Kiam la novedzo riverencas, la novedzino staras senmove. Tio estis la geedziĝa moro de Tang-dinastio. La moro daŭris ĝis hodiaŭ en malproksimaj kamparoj de la loko. En Luochuangubernio, proksime de Xi'an, startpunkto de la Silka Vojo, honestaj vilaĝanoj daŭre observas tiun antikvan moron. Nun oni ne plu kaptas sovaĝajn anserojn, ĉar en Ĉinio leĝo pri protekto de sovaĝaj animaloj estas bone observata. Vilaĝanoj nun preparas paron da sovaĝaj anseroj el ruĝa papero por la nupto. La novaj geedzoj klinsalutas ilin. Oni tiel klarigis la moron: en la loko sovaĝaj anseroj simbolas fidelan amon, ĉar la femala kaj maskla sovaĝaj anseroj estas neniam disigeblaj. Se unu el ili mortas, la alia restas apud ĝi sen mangi kaj trinki ĝis oferi la vivon al sia mortinta edz(in)o.

FORSTUMADO

Yangguan estis fama pasejo sur la antikva Silka Vojo. Tranoktante en Yangguan-vilaĝo, mi trovis, ke tie ĉiuj kamparanaj domoj apud la sabla monteto okcidente de la vilaĝo konsistas el 2 kortoj: en la antaŭa sidas salono, dormoĉambroj, kuirejo kaj en la malantaŭa — tenejo de grenoj, fruktoj kaj legomoj, domo por veturiloj kaj agrikulturaj instrumentoj, staloj kaj necesejo. En la antaŭa korto ripozas laŭbo super la domoj por ilin protekti kontraŭ sablovento kaj forta sunumado, ĉar la domoj troviĝas tre proksime al la sabla monteto. Ĉi tie oni plantis multajn arbojn. Aŭtune la vilaĝanoj fortranĉas superflujajn branĉojn, el kiuj oni faras novan laŭbon, kaj per la sekigintaj branĉoj el la malnova laŭbo oni hejtos domon en vintro.

Forstumado estas antikva moro de Dunhuang. En la antikvaj dokumentoj malkovritaj en Mogao-ŝtonkavernaro legiĝas songoklarigoj: "Songi herbojn kaj arbojn kreskantajn interne de la pordo simbolas riĉecon", "Songi fruktarbojn kaj mangiĵojn estas bonaŭguro." La antaŭuloj de Dunhuang-anoj komprenis, ke se oni volas longe kaj trankvile vivi sur la oazo en Gobio, oni nepre devas forstumi kaj protekti akvon. Pro tio la antikvuloj admonis per songoklarigo, ke oni plantu arbojn por riĉiĝo kaj feliĉo. La nunaj Dunhuang-anoj firme tenas la tradicion de forstumado, ekz., en Yangguan iu familio plantis en 1992 200 poplojn antaŭ la domoj kaj en 1993 600 malantaŭ la domoj kaj ĉe la kampoj. Vivipovaj kaj rapidkreskaj poploj estos profitodonaĵoj 10 jarojn post sia plantiĝo, tiam ili alportos al la plantintoj rimarkindan enspezon.



Loĝdomoj ĉirkaŭitaj de arboj sur la Silka Vojo

En la loko oni plantis arbojn ĉefe por protekti la lokon kontraŭ sablovento. Vidinte, ke kamparanaj domoj estas tute najbaraj al sablaj montetoj, la novaj vizitantoj opinias,


ke oni protektas kontraŭ sablovento pere de domoj. Fakte, tio montras kontraŭdezertan batalon de la tieaj loĝantoj. Kiam oni konstruas domon, oni certe plantas arbojn ĉir-

kaŭe. La arbareto malantaŭ la domo konsistas el altaj poploj, boskoj meze kaj kopso tuj apud sabla monteto. Tiu natura ŝirmilo ne nur protektas la vilaĝon kaj kampojn kontraŭ sa-

Ligna bovĉaro




Foiro sur la Silka Vojo






blovento, sed ankaŭ verdigas la sab-
lajn montetojn. Kelkaj jarojn poste,
kiam iliaj gefiloj geedziĝos, la nov-
geedzoj do translokiĝos al la refor-
mita dezerto malantaŭ la vilaĝo. ■



En tradicia funebra ceremonio

En sia nupto la novedzino montras gastamecon al sia frato, kiu alivestiĝis
por vigligi la etoson.



Manikeismaj temploj serĉataj

MANIKEISMO, fondita de Manikeo, originis en Persio en la 3-a jc. La kerno de la doktrino de manikeismo kuŝas en la teorio de 2 faktoroj kaj 3 fazoj. La 2 faktoroj signifas, ke la universo konsistas el lumo kaj mallumo, t.e., en ĝi estas dio de bono (alinome dio de lumo) kaj dio de mallbono (alinome dio de mallumo), kaj la 3 fazoj signifas fazojn primaran, mezan kaj postan, t.e., estintecon, estantecon kaj estonte-

con. Ĉe la primara fazo lumo kaj mallumo estis izolitaj reĝlandoj; mallumo invadis la landon de lumo kaj sekve de tio ekestis mondo kaj homaro; post la incendia ruinigo de la mondo sekvis la posta fazo. La mallumo estis venkita kaj ambaŭ reĝlandoj disigitaj unu de la alia.

Manikeismo furoris de la 3-a ĝis la 15-a jc. Ĝi disvastiĝis okcidenten al okcidenta Azio kaj la mediteraneaj landoj kaj orienten al centra Azio, nordokcidenta, sudorienta kaj centra Ĉinio. Dum

1 000 jaroj ĝi estis rigardata de kristanoj kiel herezo. En Tang-dinastio (618-907) manikeismo furoris en Ĉinio kaj fariĝis unu el la ĉefaj religioj de Ĉinio. Poste, plurfoje batite, ĝi aperis en formo de sekreta popola organizaĵo kaj iom post iom miksiĝis kun aliaj religioj.

Manikeismo estis ekskludata kaj subpremata en la mondo, tial historiaj restaĵoj pri ĝia ekzistado estas tre malmultaj. Oni komencis esplori ĝin en la 19-a jc kaj ĉefe en eŭropaj landoj, sin bazante sur

La manikeisma templo





Statuo de Manikeo

dokumentoj de heredata kristanismo. Serĉi orientajn manikeismajn templojn malaperintajn antaŭ 1 000 jaroj estas ĉefa studtemo por ĉinaj fakuloj.

Manikeismo cirkulis vaste kaj longe en la ĉemara provinco Fujian (Fuĝjan) de Ĉinio. Nun ĉe la piedo de Huabiao-monto en Jinjiang (Ĝinĝjang)-gubernio estas manikeisma templo Cao'an konstruita en 1339. Sur la malantaŭa granita muro de la ĉefa halo gravuriĝis reliefa figuro de Manikeo en alto de 1.52 m kaj larĝo de 0.83 m. Li sidas sur lotusfloro, la mieno milda, la okuloj malsupren rigardantaj, la orelloboj longaj, la manoj metitaj unu sur la alian kaj la vesto butonumita per ŝtofaj nodoj. En 1987 la Monda Manikeisma Simpozio prenis la bildon de la statuo kiel sian emblemon.

Historia libro diras, ke manikeismo furoris ankaŭ en Turpan-regiono de Xinjiang (Ŝinĝjang) de Ĉinio. Komence de la nuna jarcento germana fakulo trovis tie manikeismajn sutrojn. Tio estis rigardata kiel la unua grava eltrovo en esplorado de manikeismo. Ĉu troviĝas tie pliaj valoraj restaĵoj de manikeismo? Somere de 1987, vicprofesoro Chao Huashan de la Arkeologia Fakultato de la Pekina Universitato esploris ŝtonkavernojn en Turpan-regiono kaj trovis ruinojn de 10 antikvaj manikeismaj temploj en valoj de Huoyan-montaro. Tio multe ak-

celis la esploron de manikeismo.

En esplorado li kaj liaj studentoj rimarkis, ke la arkitekturo de la kavernoj kaj la temo de freskoj estas malsamaj ol tiuj en aliaj budhismaj kavernoj, kaj konjektis, ke ili rilatas kun manikeismo. Post pli ol 5 jaroj ili konstatis pli ol 70 manikeismajn kavernojn, kiuj konsistigis trionon de la tieaj kavernoj. Leginte antikvajn manuskriptojn de manikeismo elterigitajn en Mez-Azio kaj eŭropaj landoj, s-ro Chao Huashan rezonadis la karakteron kaj klasifikigon de la kavernoj, la stilon kaj signifon de la freskoj, la daton de kavernoj kaj freskoj, konsiston kaj naciecon de la temploj kaj predikadon de la religio. Tio havas gravan signifon por la arkeologio de monda religio, historio de religio kaj kultura interŝanĝo de Oriento kaj Okcidento.

Estas 3 manikeismaj ŝtonkavernoj malkovritaj de s-ro Chao Huashan. La tipa manikeisma templo havas formon de 5-etaĝa turo. Ĝi konsistas el 5 haloj, kie manikeanoj preĝis, pentis kaj recitis sutrojn. La haloj estis destinitaj ankaŭ por konservi sutrojn kaj religiajn bildarojn.

La 2 faktoroj de manikeismo komparas sin kun viva arbo (lumo) kaj morta arbo (mallumo). S-ro Chao trovis en manikeisma templo koloran freskon kun bildo de interkruciĝantaj viva kaj mor-

ta arboj. La viva arbo estas prospera, dum la morta velka.

En aliaj ŝtonkavernoj vidiĝas freskoj pri 7 trezoraj arboj. La 7 arboj simbolas la 7 kolektojn da sutroj de manikeismo. La pompaj arboj kreskas en baseno, en kiu naĝas anasoj. La arboj portas, krom fruktoj, ankaŭ orajn kaj arĝentajn bulojn, perlojn kaj gemojn. La arboj estas ornamitaj per koloraj rubandoj.

Oni povas vidi pentraĵojn "Nigra-blanka homo" kaj "Nudulino". La antaŭa figuras nudulinon starantan sur la piedoj disigitaj. La maldekstra korpoparto estas nigre desegnita kaj la konturo kaj ostaro de la dekstra parto sur blanka fono — hele desegnitaj. La pentraĵo simbolas, ke la homa korpo havas elementojn de lumo kaj mallumo, kaj ke la manikeanoj devas laŭeble konservi siajn elementojn de lumo por sin reanimi. La lasta figuras dikan nudulinon kuŝantan surtere. Manikeismo tabuas geedziĝon kaj generon, opiniante, ke generado malliberigas la elementojn de lumo en la korpo. Per la pentraĵo oni volis konsciigi la malbelecon de nudulino kaj estingi amoron al virino.


S-ro Chao konstatis, ke la menciitaj temploj estis konstruitaj en 2 periodoj. La unua periodo daŭris de la mezo de la 7-a jc ĝis la komenco de la 9-a, t.e., nelonge post la enkondukiĝo de manikeismo en Ĉinion. La temploj de manikeismo konstruitaj en tiu periodo portis pli da budhisma koloro. La dua periodo daŭris de la mezo de la 9-a jc ĝis la fino de la 10-a jc. Tiam manikeismo estis kultata de la kortego de Huihu-regno kiel ŝtata religio kaj atingis la kulminon de sia disvolviĝo. Sekve de tio, ĝi portis malpli da budhisma koloro. Fine de la 10-a jc, la kortego forpuŝis manikeismon kaj sin turnis al budhismo. Kaj el tio rezultis, ke en kelke da jaroj ĉiuj manikeismaj temploj fermiĝis kaj kadukiĝis ĝis malapero. ■



QIANJIANG

Foto de HAN WOPING

Lavo de vestoj ĉe lago




En bazaro de bovoj

Sur strateto



Qianjiang (Ĉjanĝjang) situas en orienta Si-chuan, kun 5 aŭtonomaj gubernioj de naciminitatoj. Tie vivas 2.7 milionoj da tuĝa-oj, mjaŭ-oj, han-oj kaj aliaj. En Wuling-monto konserviĝas multaj mineralaj riĉfontoj. En Qianjiang groteskas rokoj, ĉarmas lagoj kaj allogas praarbaroj.

Nun Shizhu(Ŝiĝu)-gubernio, kiu apartenas al Qianjiang, malfermiĝis al la mondo, kio akcelos la disvolviĝon de la loka ekonomio kaj plibonigos la vivon de la loĝantoj.



Mjaŭ-aj gefratoj

Ŝi vendas artaĵojn.



Rajto de amo (Novelo)

JE mencio de Ĝoj, la okuloj de onklino Meng ĉiam flagris. Mi kredis, ke tia brilo signifas teneron.

Mi plenkreskis kun aŭdado de la nomo Ĝoj. Mi amikiĝis kun onklino Meng ĝuste pro Ĝoj. Estis postpluva mateno. Mi rimarkis, ke en la kontraŭan domon venis nova loĝanto. Onklino Meng staris ĉe la pordo. Ŝiaj grizaj haroj preskaŭ hontigis ĉiujn nigraharulojn. Ŝi kapsalutis min kaj etendis la manon en pluvon. “Ĉu Ĝoj kunportas ombrelon?” ŝi diris.

Ĝoj? Ĝoj.

Tiam mi trovis, ke la pordo de onklino Meng estas ĉiam malfermita. Oni haste preterpasadis ŝian pordon. Mi ne sciis, ĉu mi estis la unua, kiu transpaŝis la sojlon de ŝia ĉambro. Kiam mi sidiĝis en ŝia malalta kanapo, mi komencis informiĝi pri Ĝoj.

“Tiam mi estis 20-jara. Li kaj mi promenis en mateno. La suno ankoraŭ ne leviĝis. La ĉielo en frua mateno estis griz-blua. Ĝoj tiris min je la mano kaj diris al mi, ke li amas...”

Onklino Meng karesis la kanapon. Ŝi iom klinis la kapon oblikve. Se eble, mi povus silenti kiel kateto dum longa tempo por aŭskulti ŝian rakontadon, ŝian rememoron. Multajn diafanajn vesperojn kaj kvietajn noktojn mi pasigis ĉe ŝi, por dividi kune kun ŝi la ĝojon pro ŝia juna Ĝoj.

Preskaŭ ĉiuj najbaroj, inkluzive miajn gepatrojn, kredis, ke onklino Meng suferis de ia malsano. Kvankam ŝia pordo ĉiam

estis malfermita, tamen nur mi vizitis ŝin por aŭskulti ŝiajn kantojn de amo.

“Li donacis al mi muslinon purpuretan... Li diris, ke purpura koloro simbolas noblecon... Mi volis plori pro emociiĝo, sed mi ne ploris, mi ne estas larmema. Mi scias, ke eĉ la plej forta viro timas larmojn.”


Poste mi havis amaton kaj dronis en arda amo. Mi ne vizitis onklinon Meng dum du monatoj. Iun posttagmezon post neĝo, mi vidis de malproksime onklinon Meng starantan antaŭ la pordo. Ŝiaj argentaj haroj siluetiĝis sur la fono de blanka neĝo, kaj subite mi sentis triston. Mi proksimiĝis al ŝi kaj trovis, ke ŝi estas laca kaj debila, kaj ankaŭ inertia. Ŝi fikse rigardis min, movetis la lipojn kaj montris rideton: “La junulo estas tre simila al Ĝoj,” ŝia diro mirigis min. “Ankaŭ Ĝoj estis tiom alta, la ŝultroj larĝaj, kaj foje mi apogis mian kapon sur lia ŝultro kaj endormiĝis... Jes, mi volus dormi por eterne, tute sen vekigo...”

Mi etendis la frostigitan fingron kaj gratetis al ŝi orellobon. Onklino Meng kaptis mian manon kaj demandis kun ekscitiĝo: “Ĉu vi... tre intimiĝis? Ĉu enamiĝo estas dolĉa?”

Degelis neĝo sub miaj piedoj. Mi retiris la manon kaj foriris de ŝi.

Poste mi ne vizitis ŝin plu. Mi estis okupita de preparado por edziniĝo. Ni devis aĉeti meblojn kaj necesajojn por kuirejo. Iun nokton, kiam mi diris ĝis revido

al mia fianĉo antaŭ mia pordo, li petegis min kisi lin. Mi leviĝis sur la piedpintoj, disetendis la brakojn, kaj tiam mi aŭdis knaron de pordo — onklino Meng aperis antaŭ mi, kun mistera rideto. Mia amato forturnis sin, kaj mi silente staris en obskuro. La obskuro peze premis min, ke mi ne povis klare vidi la vizaĝon de la onklino. Mi aŭdis nur longan sus-



piron kaj knaron de la fermata pordo.

Mia nupto estis tre gaja. Neĝo vatis la teron. Surdige eksplodis petardoj. Kiam mi sidiĝis en aŭtomobilon, mi vidis la neĝan tegaĵon ruĝe makulitan de paperpecetoj de eksplodintaj petardoj.

Mi rigardis eksteren kaj vidis scenon neforviŝeble gravuritan en mia memoro dum la tuta vivo: Maljunulino kun arĝentaj haroj, kaŭrante en neĝo, kolektis la ruĝajn paperpecetojn. Ŝiaj maljunaj manoj etendiĝis al la frosta neĝo, kie aperis multaj sange ruĝaj makuloj kolorigitaj de la paperpecetoj. Ĉu tio simbolas la amon de la onklino en ŝia vivo?

En larmoj mi fariĝis feliĉa novedzino...

Post pluraj jaroj mi reiris al mia hejmloko kaj estis surprizita de unu el la informoj: Forpasis onklino Meng. En la sekvanta mateno oni rimarkis, ke ŝi mortis. Ŝia pordo ĉiam estis malfermita, sed ĉiuj haste preterpasis ŝian pardon kaj neniu atentis ŝin. Ĉar ĝis morto ŝi restis fraŭlino kaj ne havis posteulon, la pensianta institucio prizorgis ŝian postlasaĵon. Krom vestoj kaj mebloj, inter ŝiaj postlasaĵoj oni trovis nenion ŝian skribaĵon, nek foton, nek leteron.

“Ĉu vere nenio alia pli?” mi insiste demandis.

“Ho, jes, estis purpureta muslino, en la fundo de ŝia kofro,” iu diris. “Ĝi estas nova, tute nova...”

Kie estas nun Ĝoj, kiu plenigis la vivon de onklino Meng? Mi ne povis trovi respondon. Eble Ĝoj edziĝis antaŭlonge kaj havas nun multe da infanoj kaj eĉ nepojn. Aŭ eble li jam mortis, aŭ eble... Subite en mia penso fulmis supozo: Eble tute ne ekzistis Ĝoj, nur la senlima amo de onklino Meng dum ŝia tuta vivo kristaliĝis en la figuro de Ĝoj?

Sed kio grava estis, ĉu ekzistis Ĝoj aŭ ne. Grave estas, ke ekzistas amo, ke oni ĝuas amon unu fojon dum la vivo. ■

(Daŭrigo de p. 14)

fondo de komunaj entreprenoj, investado de kapitaloj ktp. Certe estis multaj demandoj pri la hodiaŭo de sendependa Uzbekistano, pri nia vivo. Precipe multaj demandoj “trafis” nian delegacionon s-ro Kahramon Mahmudov, membron de la Parlamento de Uzbekistano, pri la laboro de nia parlamento, leĝdona praktiko kaj multo alia.

Multaj homoj, kun kiuj ni renkontiĝis dum la vojaĝo, ĝis nun danke rememoras la helpon, kiun disponigis al Ĉinio sovetiaj specialistoj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Ni ofte aŭdis: “Tiu ĉi domo estis konstruita de sovetiaj fakuloj...”, “Tiun uzinon konstruis Sovetunio...”

En Xi’an ni vidis, ke la bretoj de la magazenoj plenplenas je ĉiuj specaj nutraĵoj kaj varoj — de la tre malmultekostaj ĝis la altkvalitaj. Surstrate abundas minimangeĵoj, kelkaj el ili funkcias eĉ nokte. Necesas diri, ke la ĉina kuirarto estas io nepriskribebla, ekzemple, nur en unu restoracio, kiun ni vizitis, oni povas kuiri multajn specojn de *ĝjaŭzi*-oj, ne kalkulante dekojn da aliaj pladoj.

La jaroj de reformo, pordomalfermo kaj libera entreprenado, la nova ekonomia pensmaniero kaj la multobligita laboremo kaj diligenteo de la ĉina popolo nerekoneble ŝanĝis la aspekton de Ĉinio. En ĉiuj

(Daŭrigo de p. 24)

cio kontribui al la scienc-teknika esplorado, kaj efektive turni grandan atenton sur la financon investon, ekz. pliigi krediton al la scienc-teknikaj establoj.

Plibonigi la labor- kaj vivkondiĉojn de la sciencistoj kaj teknikistoj estas grava laboro por la scienc-teknikaj departementoj de diversnivelaj registaroj. Pro malmulta salajro kaj malbonaj laborkondiĉoj en Ĉinio nemalmultaj junaj sciencistoj kaj teknikistoj vojaĝis eksterlanden por laboro. La akrevidaj personoj jam antaŭ-

entreprenoj estas modernaj sistemoj de komunikado. Impresas ankaŭ la juneco de plimulto da gvidantoj kaj firmao-estroj, kun kiuj ni interparolis. Estas ofertata bonega servado en hoteloj, restoracioj kaj magazenoj. Videblas rezultodona utiligo de la monumentoj de historio kaj kulturo...

Unu el la ĉefaj projektoj de nia Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro estas kontaktigi Uzbekiston, kiu ekiris la vojon de memstara evoluo, kun aliaj landoj en la sferoj de kulturo, scienco, negoco kaj komerco, pere de popola diplomatio, kaj revivigi la grandan Silkan Vojon. Ni vidis multon utilan kaj alportis multajn konkretajn proponojn pri ekonomia kunlaboro el Ĉinio.

Mi pensas, ke la ĉefa rezulto de nia vojaĝo estas, ke ni konstruis la ponton de amikeco inter Samarkand kaj Xi’an, kiu firme kunligas du antikvajn urbojn sur la granda Silka Vojo, same kiel en la antikveco.

Antaŭ nelonge vizitis Samarkand la reprezentantoj de Lianhuidistrikto, kiu jam subskribis la kontrakton pri longtempa kunlaboro kun la registaro de Samarkand. La ponto de amikeco kaj kunlaboro, konstruita dank’ al esperantistoj, funkcias.

Ĝis revido, Ĉinio! ■

longe rimarkis la seriozecon de tiu problemo. Por solvi tiun problemon, la urbo Zhuhai (Ĝuhaj) kaj la provincoj Liaoning, Anhui kaj Shandong multe premiis sciencistojn kaj teknikistojn. S-ro Lü Zhonghe (Lju Ĝonghe), vices-tro de Guangdong-provinco, diris, ke la provinco nun ĉiamaniere pliigas la financon investon por la scienc-teknikaj aferoj kaj decidis konstrui pensionon por siaj sciencistoj kaj teknikistoj. La Ŝtata Planiza Komisiono decidis starigi en la venontaj 3 jaroj nombron da pensionoj por fakuloj kun postdoktoriĝa rango. ■

Ĉinaj studentoj en eksterlando

POR progresigi sian ekonomion multaj disvolviĝantaj landoj sendas studentojn al evoluintaj landoj lerni iliajn avangardajn sciencojn, teknikojn kaj administradon. De post sia fondiĝo en 1949 la nova Ĉinio sendis grandan nombron da studentoj al aliaj landoj.

De 1950 ĝis 1965 Ĉinio sendis pli ol 10 000 studentojn al pli ol 20 landoj kaj regionoj. En la kultura revolucio de 1966 ĝis 1976 preskaŭ ĉesis la sendado de ĉinaj studentoj eksterlanden. De 1972 ĝis 1977 Ĉinio sendis nur 1 548 studentojn al 32 landoj kaj regionoj, 93.7% el ili lernis kaj studis fremdajn lingvojn, dum nur 6.3% el ili lernis kaj studis naturajn sciencojn. Ekde 1978 la laboro sendi studentojn al eksterlando jam fariĝis konsistiga parto de la pordmalferma politiko de Ĉinio. La ŝtato dediĉis grandan atenton al iliaj elektado, trejnado, sendado kaj prizorgado, faris gravan reordigon en la nombro kaj konsisto de sendotaj studentoj, kaj tiel unuapaŝe formiĝis kompleta regularo. En 1978 la Eduka Ministerio de Ĉinio disdonis sciigon pri elektado de studentoj al eksterlando, kiuj studos ĉefe naturajn sciencojn kaj teknikojn anstataŭ fremdajn lingvojn. La elektitoj estos, krom sinprogresigaj stu-


dentoj kaj esploranto-studentoj, ankaŭ abiturientoj kaj unuaklasaj studentoj en altaj lernejoj, kiuj lernos en normala kurso eksterlande. De 1981 ĝis 1985 la orientilo por sendi studentojn eksterlanden estis: ĉefe studi naturajn sciencojn, iom pliigi la procenton de la studentoj lernantaj administran kaj sociajn sciencojn kaj ĉefe sendi esploranto-studentojn eksterlanden. En tiu periodo la senditaj studentoj plejparte lernis en Usono, Britio, Kanado, F.R Germanio, Francio, Japanio kaj Aŭstralio. De 1986 ĝis 1988 la ŝtato turnis sian atenton al sendado de studentoj al Sovetunio kaj orienteŭropaj landoj. De 1991 ĝis nun Ĉinio praktikis la pli liberan politikon por studentoj en- kaj ellandiĝi, tiam la disvolviĝo de enlanda ekonomio allogis la studentojn reveni la patrion post finiĝo de studo en fremdlando.

Laŭ statistiko, de 1978 ĝis nun Ĉinio sendis 190 000 studentojn al ĉ. 100 landoj kaj regionoj, la nombro de la senditaj studentoj dekobligis kompare kun tiu en la 30 jaroj de post fondiĝo de la nova Ĉinio.

La celo por Ĉinio sendi studentojn al eksterlando estas lerni avantaĝojn de la koncernaj landoj.

En la komenco de la efektivi-

gado de la reforma kaj pordmalferma politiko, kiam ĉiuj aferoj en Ĉinio sin trovis en malfacilo, ĉinaj studentoj, kiel senditoj de miliardo da ĉinaj popolanoj, eniris en la mondon. Unuflanke, ili trovis bunta la eksteran mondon, ili diligente lernis, studis, esploris, kontaktiĝis kun eksterlandanoj por posedi pli multe da sciencoj kaj teknikoj plej avangardaj en la tiama mondo; aliflanke, ili konigis la hodiaŭan Ĉinion al eksterlandanoj kaj gajnis reputacion por la patrio per siaj scioj kaj bonkonduito. S-ro Li Zhongshang, direktoro de la Softsciencita Instituto sub la Ĉina Popola Universitato, doktoriĝis pri filozofio en F.R.Germanio. En 1980 li studis en tiu lando. Foje li legis sidante sur benko en parko. Germana maljunulino venis kaj longe pririgardis lin. Fine ŝi demandis: "Ĉu vi estas ĉino?" Akirinte jesan respondon, ŝi demandis plu: "Kial vi ne havas harplektaĵon?" Post momenta stuporiĝo li konsciiĝis, ke en la okuloj de la maljunulino ĉinaj viroj ankoraŭ estas en robo kaj kun longa harplektaĵo. Li respondis kun rideto: "Ĉinaj viroj antaŭ longe jam forigis harplektaĵon." El tio oni povas vidi, kiel malmulte la mondo konas kaj kiel multe miskomprenas Ĉinion. Sekve multaj studentoj lernantaj eksterlande servas kiel "popola



S-ro Yu Yinshan (dekstre) laboras en laboratorio post lernado en alia lando.

ambasadoro". La doktoriĝa disertaĵo "Esploro pri Marksismo de Frua Herbert Marcuse" kaj la libro "Nocio pri Malsimileco kaj Historia Evoluo de la Historia Materiismo" verkitaj de s-ro Li Zhongshang eldoniĝis en Germanio kaj estis multe atentataj de eŭropaj kaj amerikaj erudiĉuloj, kiuj opiniis, ke lia studo plenigis la blankon en tiu flanko de la Okcidento. Profesoro Gerhart Schmidt, lia instruisto kaj direktoro de la Filozofia Fakultato de Bonno-universitato, laŭdis: "Sendube s-ro Li estas unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la ĉina junularo... En li mi vidis la estontan generacion de Ĉinio." Ma Songde, doktoriĝinte pri inĝenierio en Francio, voĉlegis sian disertaĵon en la Jarkunveno pri Komputila Bildologio de Eŭropo septembre de 1985. La kunveno donis 3 premiojn pri bonaj disertaĵoj. El ili li sola gajnis du. Zheng Quan en la Cremona Violonfara Lernejo de Italio diligente lernis violonfaran teorion kaj elfaris proksimume 30 violonojn en la kvar lernejaroj kaj formis sian propran stilon. La de li faritaj violonoj 5-foje partoprenis en internaciaj konkursoj kaj ekspozicioj kaj trifoje gajnis oran medalon. La vio-

lonoj ludataj de la unuaj violonistoj de la Taiwan-a Simfonia Orkestro, la Ŝtata Simfonia Orkestro de Nov-Jorko kaj la Orkestro de la Julia Konservatorio de Usono ĉiuj estis faritaj de Zheng Quan. Estas tre tre multaj elstaraj ĉinaj studentoj en eksterlando, kiaj la supre menciitaj. Krome, la ĉinaj studentoj en aliaj landoj okazigis aktivadojn, kiaj "Ĉina Tago" kaj "Ĉina Urbo", por konigi la buntan Ĉinion, organizis diversajn organizaĵojn kaj eldonis diversajn ĵurnalojn kaj gazetojn por esprimi siajn nostalgion kaj ambicion kaj prezenti proponojn por konstrui la patrolandon. Iu ĉina studento en Japanio enketis la supervojan unutrakan dudirektan trolebusan linion de Tokio. Informiĝinte en ĵurnalo pri konstruo de supervoja unutraka trolebusa vojo en Kantono, li tuj sendis al koncerna departemento sian projekton pri konstruo de ronda supervoja dudirekta unutraka trolebusa vojo en Kantono, kio estis tre valora por la trafika konstruo de Kantono. En la nova situacio de reformado kaj pordmalfermo la studentoj lernantaj en aliaj landoj per diversaj rimedoj servas al la patrolando kaj prezentas nemal multe da utilaj proponoj, kombinante la ĉinan situacion kun la eksterlandaj spertoj.

Ĝis nun pli ol 60 000 studentoj, senditaj post la jaro 1988, jam revenis la patrion kaj diligente laboras en diversaj lokoj de Ĉinio. Fine de 1991 pli ol duono de la revenintaj studentoj jam estis engaĝitaj en altrangaj fakaj oficoj, ĉ. 20 000 el ili havis diversajn scienc-teknikajn fruktojn, pli ol 200 el ili akiris ĉ. 5 000 ŝtatajn premiojn kaj 1 000 el ili akiris ĉ. 2 000 patentojn. Ili plene montras sian talenton en la moderniga konstruado de Ĉinio. La plej elstaraj personoj estas Chen Zhangliang, direktoro de

la Biologia Fakultato de la Pekina Universitato, kiu doktoriĝis en Usono kaj honore gajnis premion de "elstaraj junaj sciencistoj de la mondo"; Bai Chunli, vicedirektoro kaj profesoro de la Kemia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, kiu ricevis doktorecon en Usono kaj estas unu el la ĉefaj produktantoj de la unua balaa tunela mikroskopo; Feng Changgen, kiu doktoriĝis en Britio kaj estas profesoro de la Mekanika Inĝenieria Fakultato de la Pekina Politekniko kaj honorita kiel unu el la "dek elstaraj junuloj de la mondo"; Xu Riqian, kiu doktoriĝis en Japanio kaj la unua en Ĉinio elkulturis tubŝafon kaj tubbovon; Li Zandong, kiu doktoriĝis en Japanio kaj la unua en Ĉinio sukcese faris la provon, ke koka embrio ekster ovoŝelo povas elkoviĝi en kokidon; Zhao Yufeng, la plej juna membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj, kiu doktoriĝis en Usono; ktp. Pli kaj pli multaj konsciĝis, ke la disvolviĝo de la laboro sendi studentojn al eksterlando povas akceli la ekonomian konstruadon.

Pro bezono de laboro pri la ĉinaj studentoj en eksterlando, julie de 1987 la unua revuo por la ĉinaj studentoj en eksterlando *Ĉinaj Studentoj* aperis. En 1989 oficiale fondiĝis la Servo-centro por Ĉinaj Studentoj en Eksterlando. Ĝi funkcias kiel ponto liganta la patrion kaj popolon kun la ĉinaj studentoj en eksterlando.

Nun, kun la prospera ekonomia disvolviĝo en diversaj lokoj de Ĉinio, oni profunde komprenis la gravecon de talentuloj. Diversaj lokoj ellaboris favorajn politikojn por altiri al si ĉinajn studentojn el eksterlando.

Supozeble, ke elstaraj ĉinaj studentoj lernintaj aŭ lernantaj en aliaj landoj certe pli multe kontribuos al la scienc-teknika disvolviĝo de Ĉinio. ■

La vivo de ĉinaj profesiulinoj

HODIAŬ, kiam Ĉinio efektivigas reformadon kaj pordmalfermon, ĉinaj virinoj alfrontas multe da novaj problemoj. Iuj el ili fariĝis sukcesintoj, dum aliaj dronis en embaraso.

VOJO DE TALENTULINOJ

Laŭ statistiko de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio en 1992, en Ĉinio estas pli ol 140 milionoj da diversnaciaj profesiuloj, kaj ĉ. 53 milionoj el ili estas virinoj.

La reformado kaj pordmalfermo komencitaj antaŭ 15 jaroj vekis entuziasmon ĉe la ĉinaj virinoj por kariero. Nun inter tiuj virinoj formiĝis nova grupo el talentulinoj. Entreprenistino Sun Xiaolan (Sun Ŝjaŭlan) estas unu el ili.

Sun Xiaolan funkcias kiel direktoro de la Pekina Eksterakomerca kaj Ekonomia Kompanio de Metiartaĵoj kaj kumulas prezidanton de du entreprenoj investitaj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Ŝia sentenco estas "strebi per propra penado".

Diplomiĝinte el universitato en 1977, ŝi eklaboris en la Pekina Metiartaĵa Kompanio. Por pli rapide sin adapti al eksterakomerca laboro, ŝi eklernis fremdan lingvon en la Dua Fremdlingva Instituto de Pekino, poste ŝi ricevis trejnadon en la kurso por estroj de entreprenoj grandaj kaj mezgrandaj de la lando.

En 1990, kiam ŝi fariĝis direktoro de la eksterakomerca kaj ekonomia kompanio, ĉio de la kompanio estis senorda. Sekve ŝi decidis mal-

dungi tiujn, kiuj ne estas kompetentaj kaj ne kreas profiton. 5 laboruloj estis eksigitaj, inkl. de sekciestro de financo. La laboratmosfero tuj ŝanĝiĝis.

De post kiam ŝi ekfunkciis kiel direktoro, la kompanio profitis ĉiujare milionon da usonaj dolaroj kaj multe altiĝis la salajro de la laboruloj.

Ankaŭ Wang Xiaolan (Ŭang Ŝjaŭlan), vicprezidanto de la Pekina Elektramaŝina Novteknika Kompanio, estas talentulino. En 1984 ŝi diplomiĝis el financa kaj ekonomia instituto. Ŝi laboris unu jaron kaj fondis la Epokan Kompanion. Ok jarojn post sia fondiĝo, la kompanio havas pli ol 400 laborantojn, dek filiojn kaj du transmarajn filiojn. Ŝi senkaŝe diris: "Mi estas ambicia. Mia tuta koncepto pri valoro kaj mia aspirado en la vivo intime rilatas al tio."

FAMILIO AŬ KARIERO — ALTERNATIVO

Unu el la ĉagrenoj de la hodi-

aŭaj profesiulinoj estas alternativo antaŭ kariero kaj familia vivo.

Fininte lernadon en mezlernejo, Zhang Liping (Ĝang Liping) eklaboris kiel teknikistino en fruktoĝardeno en antaŭurbo de Pekino. En 1989, kiam la ĝardeno jam en sinsekvaj 4 jaroj deficitis kaj ŝanĝis 7 estrojn, la 23-jara Zhang Liping transprenis la administradon de la fruktoĝardeno kun ĉ. 66 hektaroj da tero kaj 86 laboristoj. Unu jaron poste, la fruktoĝardeno jam kreis produktovaloron de 500 000 juanoj kaj finis la historion, ke ĉiujare ĝi ricevis de la ŝtato monhelpon de 30 000 juanoj.

Poste ŝi ricevis novan taskon: en unu monato unuigi la maŝinisttan grupon, fruktoĝardenon kaj kampon en mekanizitan kultivejon. Tiam ŝi estis baldaŭ akuŝonta.

La kultivejo oficiale fondiĝis la 1-an de januaro 1991, kaj ŝi akuŝis la 5-an de la sama monato. Farinte al ŝi cezaran operacion, kuracisto diris al ŝi: "Bone prizorgu vian infanon, ĉar vi havas nur unu infan-

Ĉina profesiulino aĉetas fruktojn post laboro.



on en via vivo.”

Ŝi ĉiam sentas ĉagrenon, menciante sian familion, precipe sian infanon. Ŝi diris: “Mi ne estas bona edzino, nek bona patrino.” Pro okupiteco ŝi ne havas tempon por zorgi pri sia infano.

Lastjare ŝi estis sendita lerni en la Ekonomika Fakultato de la Ĉina Popola Universitato. Post 4 lernoj ŝi multe progresos en sia laboro. Sed en la 4 jaroj ŝi ne povos zorgi pri siaj edzo kaj infano. “Mi jam ne povos likvidi la ŝuldojn al ili dum la tuta vivo.” En sia sukceso ŝi sentas ankaŭ profundan aflikton.

Por helpi la virinojn liberiĝi el malfavora situacio, la Virina Instituto de la Ĉina Akademio de Administra Scienco establis la unuan “telefonan termolinion por virinoj” en Ĉinio en septembro 1992. Ĝi servas de la 16-a ĝis la 20-a horo, de lundo ĝis vendredo. La estro de la instituto konigis, ke meznombro ĉiutage oni telefonis 19 fojojn.

En telefona interparolado multaj virinoj opiniis, ke la moderna socio postulas de la virinoj pli kaj pli alte. Se la virino tutkore zorgas pri sia familio, la edzo opinias ŝin banala; se la virino estas ambicia, la edzo rigardas ŝin netenera. Do, kia estas ideala virino? Specialistoj resume diris, ke ŝi devas esti moderna virino ekstere kaj tradicia edzino hejme, sed kiom da virinoj povos atingi la normojn de la ideala modelo.

ĈU LA VIRINOJ RESTU HEJME?

Kiam virinoj troviĝis en konflikto inter la familio kaj kariero, ankaŭ la viroj komencis plendi. Plejparto el ili ne volas tro multe fari mastrumadon anstataŭ la edzino. Multaj viroj preferas, ke la virinoj restu hejme por tutkore zorgi pri la edzo kaj la infano, ke “edzoj perlaboras, la edzinoj mas-trumas.”

Kiel opinias pri tio la virinoj? Ofte aŭdiĝis la respondo: Se la edzo sola povos vivteni la familion, mi do restus hejme. Tio ŝajne

atestas, ke la labormotivo de virinoj intime rilatas al la familia enspezo. Ekz. en la lastaj jaroj aperis individuaj administrantoj kaj entreprenistoj, kaj ties edzinoj forlasis la laboron kaj restis hejme, kaj iom post iom formiĝis dommastri-na socitavolo. Koncerna persono antaŭdiris, ke kun la profundigo de la reformado en Ĉinio, eblas pligrandiĝi la trupo de la dommastri-na tavolo.

Septembre de 1988 la Pekina Virina Federacio, la Kantona Virina Federacio kaj la Hongkonga Universitato kune faris 25-monatan enketon. Laŭ la raporto ĉiuj demanditaj virinoj en la tri lokoj metis “ekonomian enspezon” en la unuan lokon de la labormotivoj kaj “sian ekonomian sendependecon” en la duan lokon. Al la demando: “Ĉu vi ankoraŭ volus aktive labori, se via edzo povas vivteni la familion?” 97.8%, 92.2% kaj 90.3% de la demanditaj virinoj de la tri lokoj respektive faris jesan respondon, aŭ volus malmulte labori. La enketo raportis ankaŭ, ke inter la demanditaj virinoj, tiuj virinoj, ju pli alte klerigitaj, des pli forte deziras labori, des pli alte taksas la gravecon de efektivigo de sia valoro. Sekve, la enketantoj opiniis, ke la enspezo kaj la labormotivo de virinoj ne estas pozitiva proporcio, multaj virinoj konsciis la gravecon de individua ekonomia sendependeco.

DIVERSFORMAJ TAGLABORANTINOJ

Antaŭe, kiam Ĉinio praktikis planizitan ekonomion, por akcenti egalrajtecon inter viroj kaj virinoj kaj garantii laboron al virinoj, la ŝtato alprenis multajn politikojn favorajn al virinoj, ekz. “viroj kaj virinoj ricevu egalan pagon por sama laboro”. Laŭ la enketo de la Tutlanda Federacio de Laborsindikato, laborproduktiveco de virino estis nur du trionoj de tiu de viro. Nun, praktikante la sistemon de merkata ekonomio, entreprenoj, konsiderante sian profiton, ellaboris altajn normojn por dungi virinojn, iuj entreprenoj eĉ ne dun-

gas virinojn.

Fronte al la severa realo, la virinoj faris malsamajn ehojn. Iuj esperas, ke la ŝtato garantios al ili laboron kaj vivtenon. Sed plejparto de la virinoj, precipe la junaj, havantaj superecon en iu fako kaj sanaj, opinias, ke profundigi reformadon de entreprenoj estas nepra tendenco. Kaj en la reformado defio kaj ŝanco kunekzistas. Iuj povas sukcesi, dum aliaj nenion atingas. Tial plej grave por virinoj estas ĝuste trovi sian lokon.

Estis atentite, ke en la lastaj dekelkaj jaroj nemalmultaj funkciis kiel “taglaborantinoj”.

La tiel nomataj taglaborantinoj ne estas simplaj servistinoj. Ili sin okupas pri la laboro ne tiel stabila nek longa, ekz. tiuj virinoj, kiuj forlasis sian hejmlokon kaj la oficon, venis al nova loko kaj nova entrepreno por labori.

Jurnalo raportis, ke f-ino Xiao Qian (Ŝjaŭ Ĉjan), diplomita el inĝenieria kaj projekta fako de la Nankina Universitato, venis al Shenzhen (Ŝengen). Ŝi venis en kabineton de la ĝenerala direktoro de iu nove fondita kompanio kaj rekomendis sin mem. Aŭskultinte ŝin, la ĝenerala direktoro diris kun bedaŭro: “Pardonon, fraŭlino, ni finis la varbadon jam antaŭ dek tagoj.” Veninte al alia kompanio, Xiao Qian memfide diris: “Mi ĵus diplomiĝis el universitato.” Neatendite, oni respondis: “Nia kompanio ne estas praktika bazo.” Post pluraj malsukcesoj Xiao Qian fine fariĝis taglaborantino en iu entrepreno funkciigata de Ĉinio kaj alia lando. Ŝia laboro estas ekzamena konstru-materialojn. Tamen Xiao Qian, spertinte malsukcesojn, ne malestimis la laboron. Tiam ŝi komprenis la veron: “Oni povas ekzisti nur post memstariĝo kaj disvolviĝi en ekzisto.”

La taglaborantinoj en la entreprenoj kune investitaj kaj administrataj de Ĉinio kaj aliaj landoj kaj en la entreprenoj investitaj sole de aliaj landoj, kie estas bona medio, alta salajro kaj intensa konkuren-

(Daŭrigo sur p. 43)

SUN AIJUN:

Vivo, filozofio kaj pekina gusto

— Pri la dramo “Birdobredantoj”

EN la pasintaj jaroj la ĉina moderna dramo falis en depresion pro manko de altira forto kaj aliaj kaŭzoj. Al la teatro mankis precipe junaj spektantoj. De marto ĝis majo ĉijare la Pekina Popola Arta Teatro surscenigis la modernan dramon “Birdobredantoj”, kiu tamen faris sensacion en Pekino.

Paul Ding faras psikan analizon al birdobredanto.



La dramo estis ludita 35 fojojn kaj la teatro ĉiufoje estis plenkaj de rigardantoj. Pli ol 103 miloj da personoj spektis la dramon. Enlandaj gazetoj kaj radiostacioj raportis pri ĝi kaj ankaŭ ĵurnalistoj de Usono, Britio kaj Aŭstralio en Pekino faris tion.

La Pekina Popola Arta Teatro famas pro sia prezentado de dramo riĉa je tradicia pekina gusto. “Birdobredantoj” karakteriziĝas ĝuste per la gustoplena pekina dialekto kaj densa etoso de la reala vivo. Tial la dramo vekis grandan intereson ĉe la pekianoj.

La dramo “Birdobredantoj” rakontas la historion de birdobredantoj. Psikologo d-ro Paŭlo Ding, kiu ĵus revenis la hejmlandon el Usono, laŭ la psikanalizo de Freŭdo rigardas birdobredantojn kiel psikopatojn. Li starigis konvaleskan centron por birdobredantoj. Tiuj ĉi malsanuloj venas de malsamaj socitavoloj kaj havas diversajn profesiojn, sed ili ĉiuj ŝatas bredi birdojn. Ili kolektiĝas en parko kaj formas malgrandan socion ekster la mondo. Tamen la malgranda socio sur la scenejo estas ĝuste la miniaturo de la ĉina socio. Inter la birdobredantoj vivas birdologo d-ro Chen kaj s-ro Charles de ĉina deveno, observanto de la Internacia Birdoprotekta Organizaĵo. La dramisto, sen distingo

de tempo kaj nacieco, kreis la ŝajne absurdan tamen efektive seriozan dramon por esplori la misteron de la homa spirita mondo.

Bredi birdojn estas okupo ŝatata de pekianoj. En la komenco de la kuranta jarcento furoris la moro en Pekino. Tiam multaj nobeloj pasigis tempon per bredado de birdoj. Troviĝas multaj tabuoj pri birdobredado. Tuj kiam oni interesiĝas pri birdobredado, oni metas sian tutan atenton sur la okupon, forgesante la ĉirkaŭaĵojn. Alaŭdo Zhang, ĉefrolo de la dramo, estas tia homo, kiu amas la birdon kiel sian vivon. Oni scias, ke la alaŭdo kantas imite al aliaj birdoj kaj eĉ krias kiel bestoj. Li absolute ne permesas al sia alaŭdo kanti iinite al ĉiu ajn birdo, alie ĝi fariĝos senvalora. Iutage la alaŭdo, la trezoro de Zhang, imite kantis kanton. Li forte koleris kaj ĵetmortigis la birdon. Ho ve! Je la momento ankaŭ li svenis kaj mortis. Alia ĉefrolo Avo la Tria estis fama aktoro de la tradicia pekina opero. Sed pro ekonomiaj malfacilaĵoj kaj aliaj kaŭzoj malprosperas la pekina opero. Estas malorganizita la teatro. Avo la Tria eklernis bredi birdojn, kiujn li rigardas kiel homojn. Li deziras kviete pasigi sian vivon kune kun siaj birdoj.

En Pekino ofte vidiĝas homoj, kiuj promenas surstrate tenante kaĝon kun birdo, kaj grupoj da homoj, kiuj parolas pri aŭ rigardas al birdoj kaj aŭskutas ilian kantadon. La neesprimebla amuzo pri birdobredado ĝojigas ankaŭ la rigardantojn. La ŝercaj kaj sarkasmaj vortoj de la roloj ridigas kaj pensigas la rigardantojn. Ekz. Avo la Tria diris: “Krom mi, ankaŭ aliaj grupanoj ne faras prezentadon... Ĉar prezentado donas malpli da profito. Nun, neniuj interesiĝas pri la pekina opero.” Tio montris lian



Avo la Tria rakontas pri birdobredado.

maltrankvilecon pri la fortuno de la opero kaj lian fortan deziron al ĝia reformo.

Je la unua vido, la dramo temas pri ordinaraj birdobredantoj, sed fakte, la dramisto intencas per tio malkovri la animstaton de la homoj. Psikologo d-ro Paŭlo Ding, kiu psikanalizis la “malsanajn” birdobredantojn, devis unue sin resanigi, ĉar ĝuste li mem havis anormalan psikon. Dronante en la psikanalizo de Freŭdo, li rigardis preskaŭ ĉiujn kiel malsanulojn kaj forgesis la homan naturon. Anormala psikologo volas resanigi “malsanajn” birdobredantojn. Ĉu tio ne

estas centprocenta ŝerco? En la epoko, kiam la socio estas en granda ŝanĝiĝo, rompiĝas la tradicia spirita apogilo, ŝanĝiĝas malnovaj konceptoj, tamen ankoraŭ ne estas starigita spirita mondo konforma al la tajdo de la epoko. Multaj malĝojas, ke ili ne trovis sian pozicion en la socio, kaj perdas sian idealon kaj fidon. La dramo “Birdobredantoj” spegulas la tutan socion per la malgranda socio sur la sceno. La anormalaj birdobredantoj figure prezentas homojn en la reala vivo. Kiel resanigi ilin? La dramo ne montras, kia devas esti la normala homo, sed la ŝercaj

kaj sarkasmaj vortoj de la roloj pensigas la rigardantojn, kio estas la signifo de la vivo. Eble en tio kuŝas la kaŭzo, kial la dramo “Birdobredantoj” faris sanĉion.

En intervjuo dramisto Guo Shixing (Gŭo Ŝiŝing) diris: “Mi ne intencas malkaŝi la difinitan signifon de la vivo. Per tiu ĉi moderna dramo mi volus montri al la rigardantoj nur la veron de la socia vivo. La homoj, kiuj kreis la civilizacion kaj estas katenitaj de ĝi, devas trovi naturan vivon.” Iom poste li aldonis: “Mi verkis la dramon por la junuloj. Ili kreskas, subpremate de la reala vivo. Kiel birdoj en kaĝo, mankas al ili ne manĝaĵo nek trinkaĵo, tamen ili devas vivi en pli vasta spaco. Mi esperas, ke la dramo ‘Birdobredantoj’ liberigos ilian spiriton.”

40-jara Guo Shixing havas riĉan travivaĵon. Fininte sian studadon en lernejo, li laboris en kamparo kaj fabriko. Li estas ĵurnalisto. Post laboro li sin okupas per birdobredado, ŝakludo kaj fiŝhokado. Li havas multajn dramistajn amikojn. La trilogio “Nenifarantoj” esprimas lian komprenadon kaj filozofadon pri la vivo post multjara laboro. La dramo “Birdobredantoj” estas unu el ili. ■

(Daturigo de p. 41)

co, ĉiam estas minacataj de maldungo. Sed kiel ili ekzistas en tia situacio?

Fino Guo Xiaohang (Gŭo Ŝjaŭhang), direktoro de la restoracio de la kvinŝtela Ĉina Hotelo investita de Ĉinio kaj alia lando, antaŭe estis tradukistino de la Administra Asocio de Ĉinaj Entreprenistoj. Ĉe la komenco de la entreprenado de la hotelo en 1989 ŝi feliĉe estis elektita el miloj da kandidatoj.

Guo Xiaohang respondecas ĉefe pri vendo kaj luigo de la ĉ. 40 bankedejoj kaj kunvenejoj de la

hotelo. Sendube ŝia laboro estas tre peza, ĉar en Pekino funkcias tro multe da hoteloj. En tri jaroj ŝiaj kolegoj jam dufoje ŝanĝiĝis pro nekompetenteco aŭ tro peza laboro. Nur ŝi restas. Ŝia fremdlanda mastro diris al aliaj: “Ĉiuj povas foriri, escepte de Guo Xiaohang.”

Kial ŝi povas stari en nevenkebla pozicio? Ŝi diris: “Mi laboras kiel maŝino.” Ŝia hejmo distancas de la hotelo je veturado de unu kaj duona horoj. Je la 8-a kaj duono ŝi akurate venas al sia posteno, sed ŝi neniam povas akurate foriri de la laboro. Ofte ŝi laboras ĝis profunda nokto, iam eĉ tutan nokton, sen kromsalajro. “Ĉi tie, nur kiam oni

laboras per tuta forto por elmontri sian talenton, oni povas akiri konfidon de la mastro kaj promocion.”

Ŝi jam estis en la aĝo por patriki, sed ŝi diris: “Mi ne kuraĝas havi infanon pro tia labormedio. Foje ankaŭ mi sentas malkontenton. Mi senĉese laboras kaj ne havas tempon por ĝui. Kian vivon mi vivas?” Ŝi plendas, tamen ŝi ne volas lasi tiun laboron. Ŝi diris: “Ĉi tie oni taksas la laborantojn ne laŭ iliaj aĝo kaj servodaŭro, sed laŭ ilia kontribuo. Tial, se vi estas kompetenta, vi povos promociiĝi.” Tio sendube estas la plej granda logo por tiuj, kiuj volas disvolvi sian talenton. ■

FURORAS EN PEKINO FAVORATAJ BESTOJ

EN la lastaj jaroj ni prezentis al niaj legantoj ŝanĝigon en la vivo de pekinanoj per artikoloj “Freŝaj Floroj Ŝike Furoras en Pekino”, “En la Halo de Kalisteno”, “Al Diverseco de Laŭsezonaj Vestoj” k.a. Kompreneble tiuj fenomenoj ne disigblas de ŝanĝigoj de la vivkondiĉoj kaj cirkonstancoj. Ĉi-sube mi konigos al vi furoron de favorataj bestoj en Pekino.

BAZAROJ DE BIRDOJ

Pekinanoj havas longan historion kaj tradicion bredi birdojn. Ĉi-matene oni povas vidi, ke multaj homoj promenas kun birdokaĝoj sur stratoj kaj en parkoj. Kaj sekve de tio la bazaroj de birdoj tre viglas.

Inter la bird-bazaroj de Pekino 5 estas bone konataj pro siaj bona organiziteco, grandeco, diverseco de birdoj kaj bona ordo. Krom ili, en Pekino estas ankaŭ multaj ne-regulaj bird-bazaroj. Proksime de ili estas loĝkvartaloj, kie belas ĝardenoj, verdas herbejoj kaj

prosperas malgrandaj arbaroj. Amantoj de birdoj kolektiĝas tie por refreŝigi, apreci kaj interŝanĝi birdojn. En Pekino ne nur maljunuloj, sed ankaŭ mezaĝuloj kaj junuloj bredas birdojn. Laŭ nekompleta statistiko 1.6% de la pekinanoj bredas birdojn.

Kutime en Pekino oni bredas ĉefe alaŭdojn, kanariojn kaj turdojn. Emerita laboristo Yang Shubo, lerta en alaŭdobredado, pasie amas birdojn. Antaŭe li suferis de malsanoj. Operaciinte lin pri cerba tumor, kuracisto diris, ke li vivos ne pli ol 5 jarojn, sed li jam sane vivis 13 jarojn post la operacio. Li ŝuldis tion al la birdobredado.

Ĝenerale oni aprecas birdojn laŭ iliaj plumoj. La birdobredado nun estas grava rimedo por riĉigo en iuj landoj. Ekde la komenco de la 80-aj jaroj, Ĉinio grandkvante importis poraprecajn birdojn. Intertempe, mi vizitis kelkajn birdobredantojn. Unu el ili loĝas en malgranda domo, tamen en la vestiblo viglas diversaj birdoj, kiaj alaŭdoj, turdoj kaj garoloj,

kaj en la interna ĉambro pepas papagoj, malgrandaj buntaj orizivoroj (*Munia oryzivora*) kaj orizivoroj kun blanka talio. En la hejmo de alia birdamanto pendas 40 birdokaĝoj de buntaj orizivoroj. Mi vizitis ankaŭ iun alian birdamanton, kiu lasis unu ĉambron speciale al papagoj.

MULTEKOSTAJ HUNDOJ

En la Ĉina Ĝardeno de Hundoj ĉe antaŭurbo de Pekino, unu Lhasa-a spaniolo kostas 2 000 juanojn (5.7 juanoj egalas unu usolan dolaron), japana hundo kun pintforma buŝo — 42 000 juanojn, germana hundo kun nigra dorso — 15 000 juanojn, ĉina hundo kun longhara kapo — 140 000 juanojn, pekina palaca mopso — 300 000 juanojn ktp.

La prezaltiĝo de hundoj montras prosperon de la hunda merkato. Laŭ statistiko, en Ĉinio estas ĉ. 100 milionoj da hundoj kaj en Pekino miliono. Bone konata foiro de hundoj ne ekzistas en la urbaj kvartaloj de Pekino, sed en sudokcidenta kaj nordorienta Ĉinio viglas famaj foiroj de hundoj.

Antaŭe ĉinoj bredis hundojn ĉefe en kamparo por gardi la hejmon. Iliaj specio kaj raso estis diversaj. Post kiam hundidoj naskiĝis, oni donacis ilin al amikoj kaj parencoj. Estas malpermesate bredi hundon en urboj por protekti publikan medion kontraŭ infektaj malsanoj.

Sed fakte, en la lastaj jaroj, tiu malpermeso iom post iom eksvalidiĝis. Hundobredado ekfuroris en urboj. Pli kaj pli multaj urbanoj, ĉu aktoroj, ĉu kantistoj, ĉu artistoj, ĉu ordinaraj laboristoj, ekŝatis hundojn. La Pekina Ĝenerala Hospitalo de Poraprecaj Bestoj informis al mi, ke en 2 monatoj post ĝia starigo ĉiutage po pli ol 20 hundoj venis konsulti veterinaron. En urboj oni bredas hundon ĉefe por distriĝo, ekz., bela malta hundo kun blankaj longharoj altas je malpli ol 40 cm



Papili-hundoj

kaj pezas nur 2.5 kg. La malgranda pekina mopso, gracia papiliohundo estas vere amindaj.

200 MILIONOJ DA KATOJ

Kvankam oni opinias, ke hundoj estas fidelaj kaj katoj ne, tamen la nombro de katobredantoj multe superis tiun de hundobredantoj, ĉar la ŝtato ne malpermesas breĉi katon. Laŭ statistiko, en Ĉinio estas 200 milionoj da katoj, t.e. duoblo de hundoj.

Antaŭe ĉinoj breĉis katon ĉefe por kapti musojn. Sed nun estas tre malmultaj katoj, kiuj volas kapti musojn. Fiŝoj estas ilia plej ŝatata manĝaĵo, tamen ili ne prenas, se la fiŝo ne bonguste preparita. Mia najbaro havas grasan katon kun nigra hararo. Ĝi estas vere frandema.

En Pekino, iu emerita instruistino havas 150 katojn. Laŭdire ŝi devas elspezi ĉ. 3 000 juanojn ĉiunmonate por nutri ilin per fiŝoj, porka hepato, bovaĵo kaj katojn per bovina lakto. Kompreneble ŝia pensio ne sufiĉas por tio, ŝi

do petas monhelpon de famuloj kaj pruntas, esperante, ke en Pekino naskiĝos katobreda asocio kiel eble plej baldaŭ.

Kvankam en Ĉinio la breditaj katoj estas pli multaj ol hundoj, tamen la bredantoj ne donas sufiĉan atenton al raso de katoj. Iu pekiano havis 90 katojn. Li vendis ilin ĉiujn al kompanio de agrikulturo, industrio kaj komerco. Spertulo juĝis, ke inter ili estas nur unu bonrasa kaj ĉiuj aliaj ne.

Multaj amantoj de katoj ŝatas persajn katojn, ĉar ili havas ne nur molan, delikatan kaj longan hararon, sed ankaŭ interesan aspekton. En foiro unumonata longhara kato kostas 200-300 juanojn, sed la ĉi-tieaj persaj katoj plejparte estas hibridaj.

ORAJ KAJ TROPIKAJ FIŜOJ

Materialo konigas, ke kiam oni fiksas sian atenton al orfiŝoj kaj tropikaj fiŝoj naĝantaj malrapide kaj gracie, produktiĝas en lia korpo pli da adrendlino, kiu malpezi-


gas ŝarĝon de la koro, reguligas kaj ripozigas la cerbon. Ĉu oni tion scias aŭ ne, nuntempe en Pekino 230 000 loĝantoj ŝatas akvariajn fiŝojn kaj kelkcent specoj da fiŝoj vendiĝas en bazaroj. En frosta vintro, se oni havas en sia varmeta ĉambro grandan akvarion kun akvaj plantoj kaj fiŝoj ruĝaj, nigraj kaj blankaj libere naĝantaj ene, ili certe sentas grandan plezuron.



La plej granda foiro de fiŝoj troviĝas sudoriente de trefkruciĝo de la okcidenta urbo. Tie staras du vicoj da grandaj budoj, en la orientaj oni vendas ĉefe orfiŝojn kaj en la okcidentaj — tropikajn fiŝojn. En dimanĉo ĝin ofte vizitas 10 000 homoj. Iam oni vendas orfiŝojn kaj tropikajn fiŝojn ankaŭ sur liberaj lokoj ambaŭflanke de la aŭtovojo.

La valoraj tropikaj fiŝoj vendataj en pekinaj foiroj plejparte estas aertransportitaj de Kantono en suda Ĉinio, nur malgranda parto estas produktita en Pekino. En ĉiuj distriktoj de Pekino funkcias fiŝ-bazaroj. ■

Junaj amantoj de rokmuziko

Fotoj de DA WEI





EKONOMIO

● Antaŭ nelonge Ĉinio publikigis la anoncon pri gravaj teknikoj enkondukotaj en 1993-2000.

Estos enkondukitaj sume 210 teknikaj projektoj en agrikulturo, energio, trafiko, poŝtkomuniko k.a., kun valoro de proksimume 30 miliardoj da usonaj dolaroj. Oni enkondukos ĉefe kompletajn kaj ŝlosilajn instalaĵojn, kompletigajn aparatojn kaj avangardajn teknikojn kaj la kapitalo venos el la centra registaro, ĝiaj departementoj kaj lokaj organizaĵoj, kredito de alilandaj registaroj, internaciaj financaj kaj komercaj organizaĵoj.

● La ekspluatado de Yangzi-rivero postulas konstruadon de multaj pontoj. En la 60-aj jaroj Ĉinio konstruis la fervoj-ŝosean Nankinan Pontegon super Yangzi-rivero longan je 6 772 m. Ĝi estas listigita kiel rekordo de Guinness. La Jiujiang(Ĝiŭĝjang)-a Pontego super Yangzi-rivero, konstruita kaj transdonita al uzado antaŭ nelonge, je 400 m pli longas ol la supremeiciita ponto. Nun ĝi estas la plej longa tiuspeca ponto en Ĉinio. Oni informas, ke nun super la rivero 5 pontoj estas en konstruado, kaj 6 en planado.

● Junie de 1993, la Banko de Ĉinio subskribis en Londono interkonsenton kun internaciaj bank-grupoj, ke ĝi emisios sur la londona merkato eŭropajn obligaciojn en valoro de 200 milionoj da usonaj dolaroj. La obligacioj estos repagotaj post 5 jaroj kaj la interezo egalos al tiu de la Londona Banko plus 0.50%. Tio markas, ke la Banko de Ĉinio denove kolektos mezkaj longperiodan kapitalon, post kiam ĝi ree iris sur la eŭropan merkaton en 1988.

● En Ĉinio la aviadila arbarizado estis farata laŭ la ŝtata plano en 1983. Ekde tiam oni aviadile arbarizis 10 milionojn da hektaroj. Nun jam kreskas arboj sur pli ol 7 milionoj da hektaroj aviadile arbarizitaj. En la pasintaj 10 jaroj la sfero de aviadila arbarizado de Ĉinio je 1 000 km etendiĝis norden. Krome, oni faras tion ankaŭ sur dezerto.

● Fakuloj antaŭdiris, ke teo fariĝos reĝo de trinkaĵoj de la mondo en la 21-a jc.

Nun Japanio fariĝis lando te-importanta, anstataŭ te-eksportanta. La proporcio de la teo importita kaj eksportita por Hindio, la plej

granda te-produktanta lando de la mondo, estas 100:210, kaj Ĉinio okupas la 2-an lokon en la mondo en la produktokvanto kaj eksportokvanto de teo respektive.

KULTURO

● Post 10-jara penado juna pentristo Tao Houwu de Hunan-provinco, Ĉinio, kreis la rulaĵon de ĉinstila pentraĵo sub la titolo "Olimpikoj en 2000 jaroj", kun longo de 202 m kaj larĝo de 0.92 m. Ĝi konigas la originon kaj evoluon de la Olimpiaj Ludoj. Membroj de la Internacia Olimpika Komitato konstatis post ekspertizo, ke ĝi estas la plej longa pentraĵo pri la Olimpikoj en la nuna mondo.

● Sub la aŭspicioj de la Ĉina Arta Instituto, Ĉina Societo de Kaligrafoj kaj Pentristoj kaj la Shenzhen-a Limigita Kompanio de Germanioriča Trinkajo Xingchuan (Ŝingĉuan) komenciĝis la aktivado, en kiu dekmilo da pentristoj kreos 20 000-metran rulaĵon de ĉinstila pentraĵo.

30 mezaĝaj kaj junaj kaligrafoj kaj pentristoj de Ĉinio aŭte ekveturis de Pekino la 30-an de majo en 5 grupoj al diversaj lokoj de la lando. Por krei la rulaĵon ili kontaktiĝos kun multaj kaligrafoj kaj pentristoj, inkluzive de tiuj de Taiwan, Hongkong kaj Aomen, kaj finplenumos kune la rulaĵon longan je 20 000 m antaŭ la fino de 1993.

● La Ĉina Belarta Domo, honorata kiel la Supera Halo de la Ĉina Arto, jam travivis 30 jarojn.

Kiel la unua ŝtata belarta domo konstruita post la fondiĝo de la nova Ĉinio, ĝi havas ĉ. 10 000 verkojn de la nuntempa Ĉinio kaj 40 000 valorajn popolajn artaĵojn. Tie okazis sennombraj ekspozicioj de artaĵoj. Nun ĝi enviciĝas inter la famaj belartaj domoj de la mondo.

● Ĉinio energie faras edukadon por elimini analfabetecon inter la plenkreskuloj fine de la 20-a jc.

Samtempe oni dediĉas grandan atenton al primara edukado de la senanalfabetigitoj. En Ĉinio funkcias 420 000 kulturaj kaj teknikaj lernejoj, en kiuj lernas ĉiujare ĉ. 40 milionoj da kamparanoj. La primara edukado estas popularigita en 90% de la loĝlokoj de Ĉinio. Nun en du trionoj de la gubernioj de Ĉinio malpli ol 15% de la junuloj kaj plenkreskuloj estas analfabetoj.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● Inĝeniero Bu Yinkun de la Minmaŝina Fabriko de Qinghai inventis senpreman kaldronegon

por varma akvo, ŝanĝinte la tradician projekton uzatan en la mondo dum pli ol 100 jaroj por fari kaldronegon de varmakva hejtado. Li kunigis ordinaran pufiĝintan cisternon kaj kaldronon, por ke la kaldrono funkciu absolute en senprema stato, tiel tute maleblas ĝia eksplodo.

- En la ĉina kamparo estas vaste uzata la tekniko de plantado sub plasta membrano. En 1992 la areo kovrita de plasta membrano superis 4.7 milionojn da hektaroj. Laŭ nekompleta statistiko, en 1992 la valoro de agrikulturaj produktoj pliiĝis je 8.5 miliardoj da juanoj, dank' al apliko de tiu kulturmaniero en Ĉinio.



Forcejo

- Post multjara esplorado esploristo Tu Lichuan kaj aliaj de la Agronomia Akademio de Henan elkulturis la unuan hibridan sezamsemon superfortan kaj praktikan en la mondo, kaj tiel realiĝis la deziro plialtigi la produktokvanton de sezamo per hibrida semo.

Post kuna eksperimento en Ĉinio la hektara produktokvanto atingis 1 121 kg, je 30% pli multe ol tiu de bonspesia sezamo, kaj la maksimuma hektara produktokvanto superis unu tunon.

- Semkulturisto Fan Lian kaj liaj kolegoj de Henan-provinco sukcesis en kulturado de semo de hibrida tritiko, kiu estas rigardata kiel malfacila esplortemo pri genetika semkulturado en la mondo.

La hektara produktokvanto de la poreksperimenta hibrida tritiko "Yuza I" atingis 3 750 kg, je 15% pli multe ol tiu de la bonrasa tritiko multe kulturata.

MEDICINO

- La medicino pri organa grefto progresas en

Ĉinio. De la 70-aj jaroj ĉinaj kuracistoj faris grefton al pli ol 6 000 pacientoj. Ili povas grefti renon, hepton, koron, pulmon, pankreaton, pankreatan insuleton, paratiroidon, surrenan glandon, lienon, medolon, korneon, testikon, brustan glandon, tiroidon, hepatajn kaj lienajn ĉelojn, histon de la cerbo kaj galkanalon. Ĉinio posedas avangardan teknikon de liena grefto en la mondo kaj la efiko de rena grefto estas plej bona. Ĉinaj kuracistoj faris renan grefton al 4 600 pacientoj, inter kiuj iuj ankoraŭ vivas 12.5 jarojn post la grefto. Kaj la nombro de ĉinaj pacientoj, kiuj ricevis insuletan grefton, estas la plej granda en la mondo.

TURISMO

- Kun ekonomia disvolviĝo kaj plialtiĝo de la vivnivelo de la popolo, turismo iompostiome fariĝis grava hobbio de ĉinaj loĝantoj. En la pasinta jaro la nombro de la enlandaj turistoj atingis 330 milionojn kaj tiurilate la monsumo enspezita de la ŝtato atingis 25 miliardojn da juanoj, je 4.7% kaj 25% respektive pli multe ol tiuj de 1991.

De la pasintaj 2 jaroj rapide disvolviĝas la enlanda turismo. En majo de 1993 estis 2 104 triarangaj turismaj servoj por enlanda vojaĝo. La unua- kaj duarangaj turismaj servoj, kiuj akceptas ĉefe alilandajn turistojn, turnas sian atenton ankaŭ al la enlanda turismo. La enlandaj turistoj venis ne nur el ĉemaraj regionoj, sed ankaŭ el la landinterno. Pli kaj pli multaj el ili interesiĝas pri longdistanca vojaĝo.

Alilandaj turistoj en la parko Ĉiela Altaro



KOMPLETA SISTEMO DE LA ESPLORO PRI PALEOANTROPA EVOLUO EN ĈINIO

En la pasintaj jaroj ĉinaj arkeologoj atingis multajn sukcesojn en esploro pri paleoantropo kaj paleolitiko kaj ekhavis kompletan sistemon de la esploro pri paleoantropa evoluo. Ĉinio jam fariĝis grava lando por esplori la originon, migradon kaj evoluadon de la paleolitika kulturo kaj paleoantropo.

Antaŭe iuj eŭropaj arkeologoj opiniis, ke la homaro originis en la Orient-afrika Fendvalo meze de Afriko, kaj la ruinoj de paleoantropoj en aliaj lokoj sur la tero estas nur iliaj migrejoj. Nova eltrovo de ĉinaj stratigrafoj kaj paleontologoj neis la vidpunkton. En 1987 oni elfosis fosilion de prahomo en la baseno Yuanmou de Yunnan kaj konstatis per la esploro la tempon de la evoluo de antropoido al moderna homo.

La kompleta sistemo de la evoluo skizita de arkeologoj montras, ke la paleoantropoj (orientanoj) en Yuanmou vivis antaŭ 4 milionoj da jaroj. Oni konstatis post ekzameno, ke Yuanmou-anoj vivis antaŭ 1.87 milionoj da jaroj. La fosilio de la prahomo de Wushan de Sichuan trovita antaŭ ne longe montras, ke la Wushan-aj prahomoj vivis antaŭ 2.04-2.01 milionoj da jaroj. La ordo de la evoluo de la postaj paleoantropoj estas jene: la starantaj prahomoj de Gongwang-monto de Lantian, Shaanxi (Ŝenŝji), vivis antaŭ 115-110 milionoj da jaroj; la starantaj prahomoj de Chenjiawo (Ĉengjau'ŭo) de Lantian vivis antaŭ 650 mil jaroj; la pekinaj prahomoj de Zhoukoudian (Ĝoŭkoŭdjan) vivis antaŭ 460 000-230 000 jaroj; la starantaj prahomoj de Miaohou-monto de Benxi (Benŝji), Liaoning, vivis antaŭ 240 000 jaroj; la homoj de Dali, Shaanxi, vivis antaŭ 230 000-190 000 jaroj; la prahomoj de Dingcunvilaĝo en Xiangfen (Ŝjangfen), Shanxi (Ŝanŝji), vivis antaŭ 130 000-80 000 jaroj; la prahomoj de Xujiayao (Ŝjuĝajajŭ) en Yanggao, Shanxi, vivis antaŭ ĉ. 60 000 jaroj; la prahomoj de Wuqihe (Uĉjihe) de la Interna Mongolio vivis antaŭ 45 000-36 000 jaroj; kaj la montsupraj kavernaj homoj de Pekino vivis antaŭ 18 000-10 000 jaroj.

Ĉinaj arkeologoj malkovris en la basenoj de Nihewan kaj Sanggan-rivero de Hebei sinsekvon da paleolitikaj stratumoj komenciĝantan de Donggutuo kaj la ruino Xiaochangliang (Ŝjaŭĉangljang) kun historio de 10 000 jaroj. Ili malkovris paleolitikajn ruinojn ankaŭ en la lateritaj regionoj en Guangxi (Gŭangŝji), Hubei, Shaanxi kaj suda Anhui. Tio montras la diferencon inter la paleolitikaj kul-

turoj de suda kaj norda Ĉinio. En la klimata ŝanĝiĝo de la glacia epoko al la interglacia epoko la tiamaj loĝantoj migris de tempo al tempo, kio akcelis la interŝanĝon de la kulturoj de nordo kaj sudo. Kaj la kulturo de intelektaj prahomoj en la meza kaj malfrua fazoj de la lasta glacia epoko enkondukiĝis en Amerikon per la kontaktiĝo inter azianoj kaj amerikanoj.

Arkeologoj konstatis ankaŭ, ke la ĉevaloj de Yunnan en sudo kaj tiuj de Sanmen en nordo aperis antaŭ 2.5 milionoj da jaroj, kaj la trifingraj ĉevaloj malaperis, travivinte milionon da jaroj. La mamulaj fosilioj malkovritaj en iuj lokoj de la sudo montras, ke pro la malvarmiĝo en la 4 glaciaj epokoj la nordaj mamuloj migris suden 4-foje; male, kiam la vetero varmiĝis en la interglacia epoko, bestoj en la sudo arope migris norden kaj elefantoj kaj aliaj grandaj bestoj vivis en la nordo en la lasta glacia epoko.

PRI NOMOJ DE ĈINAJ PLADOJ

La ĉina gastronomio karakteriziĝas per koloro,odoro kaj gusto, kaj ankaŭ ĝiaj nomoj estas tre interesaj. Ĝenerale oni nomas pladojn per jenaj metodoj:

I. **NOMO PER SIMBOLO** Laŭ la psiko de klientoj, kiuj ĉasas kuriozaĵojn, oni troigas la specialaĵojn de la plado, por ke ĝi estu pli alloga. Kiam oni donas nomon al plado, oni akcentas ĝian versimilecon de formo, ekzemple "Hirundo revenas en la neston"; aŭ oni akcentas la rapidecon kaj lertecon de la kuiristo, aŭ oni faras la pladon imite laŭ vidindaĵo de sia hejmloko...

II. **NOMO LAŬ VERO** Laŭ la nomo de la plado oni povas tuj scii la materialojn, la metodojn, la lokajn trajtojn, la iniciatinton de la plado kaj eĉ la devenlokon de la plado. Ekzemple "Ĉepo kaj porka kotleto" kaj "Terpomo kaj bovaĵo"; "Fiŝkapo en pota" kaj "Tohuo en pota". La komuna karakterizaĵo de tiuj pladoj estas elstarigo de ĉefa ingredienco kaj fidela spegulado de specialaĵo de la plado. La nomoj de tiaj pladoj estas modestaj kaj tuj kompreneblaj.

III. **NOMO LAŬ MORO KAJ KUTIMO** Multaj ĉinaj pladoj ricevas la nomon laŭ la loka popola moro aŭ vivkutimo, por enkorpigi specialan signifon. Ekzemple pladoj en novjaraj tagoj kaj festotagoj havas la nomojn "Pli da riĉaĵo kaj pli da feliĉo" kaj "Pliboniĝo jaro post jaro". Pladoj por nuptaj festenoj havas la nomojn "Amo dum la tuta vivo", "Havu frue filon" k.s. Pladoj por celebra festeno havas la nomon "Kunveno de herooj" k.s. La nomoj de tiaj pladoj estas relative belaj kaj delikataj.

FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ



Sur la rivereto Rio en Giulio

de **GORNI GINEVRA** (Italo)

Sunsubiro ĉe malsupra Lago de Mantova

de **GORNI GINEVRA** (Italo)





Ĉe fonto en arbaro

Foto de YAN JIN

